

POLA ESPERANTISTO

**JARO XXIII. * AŬGUSTO
SEPTEMBRO 1929. * NR. 8-9.**



**ROK XXIII. * SIERPIEŃ
WRZESIEŃ 1929. * NR. 8-9.**

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—. duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—.

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Podwójny numer Zł. 1.40 Duobla numero.

Bezpłatnie rozdaje materiał propagandowy Akademickie Koło Esperantystów w Krakowie. Jedynie za koszta administracyjne i przesyłkowe pobieramy 1.50 zł. od paczki kilogramowej, w której mieszczą się broszury, gazety, afisze, ulotki, pocztówki, nalepki i t. p. W miarę możliwości uwzględnia się życzenia specjalne. Przyjmuje się znaczki pocztowe i „U E A respondkuponoj“. Zwracać się do: Ak. Koła Esp., Winc. Pola 5/ I p. lub Admin. Pol. Esp.

TREŚĆ — ENHAVO:

O. BUJWID: LA BUDAPESTA KONGRESO INTERNACIA. III. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO. DR. ANTONI CZUBRYŃSKI: LA KONKLUDO EL STATISTIKO (KONGRESA PAROLADO). HALINA WEINSTEINÓWNA: ĆE-KURSO EN BUDAPEST. JÓZEF GARBACIK: „PAĈJO BEM“. O. B.: EL LA GAZETARO. JÓZEF TOCZYSKI: SUPERNACIISMO DE HEROLDO. LIDJA ZAMENHOF: BIRDO EN KAGO! FEZ.: TERURA KVARONHORETO SUR LA OKCIDENTO — (NENIO NOVA). J. TUWIM: INTERPAROLO — (TRAD. EUG. RYTENBERG). W. RYMKIEWICZ: MI VIDIS SIN... GRENKAMP-KORNFELD: SONAS SERPOJ, LUMAS SUNO... TOMMY: „JURNALO DE ANTAŬ 200.000 JAROJ“ (TRAD. T. HODAKOWSKI). X.: DUONTAGON AL DöMSöD. HALINA WEINSTEINÓWNA: KIAL VIESTAS JAM FOR...! LA ODORO DE L' MORTO (TRAD. PROF. SYGNARSKI). DR. L. DREHER: TRADUKA KONKURSO. POLLANDA KRONIKO. † LEOPOLD KRONENBERG. BIBLIOGRAFIO. BULTENO DE U. E. A. LETERKESTO, ODEZVY I ZAWIADOMIENIA.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO.

KRAKÓW
SIERPIEŃ 1929 AUGUSTO
WRZESIEŃ SEPTEMBRO

Nr. 8-9 N-o

LA BUDAPESTA KONGRESO INTERNACIA.



Li ne devas forgesi, ke antaŭ preskaŭ cent jaroj en Budapesto estis de Grafo Stefano Szechenyi, la fondinto de la Hungara Scienca Akademio profetita la eltrovo de unu, por ĉiuj nacioj komprenebla, artefarita, lingvo. Do estas tute pravigita la propono starigi por la memoro de tiu granda hungaro la memortabulon kiu ĵus efektiviĝis. Li ĉiam celis pli grandan kulturon kaj disvolvigon por sia patrolando kaj estis unu el plej noblaj kaj kulteremaj grandaj patriotoj. Li inter aliaj grandioze faritaj verkoj unuigis la urbojn Buda kaj Pest kreinte unuan ŝtonponton inter du urboj. Ĉu li antaŭvidis ankaŭ tiom necesan unuigon de popoloj de la Eŭropo, pri kio oni jam tiom multe hodiaŭ parolas?

Mi vidis Buda Peston antaŭ jam kvardek jaroj. Jam tiutempe la urbo estis vere impona. Post miaj grandaj vojaĝoj lastatempe faritaj mi preferus iomete resti hejme kaj kolekti — ordigi grandan materialon kiun mi alportis pri Brazila vivo, sed Budapesta kongreso estis tro alloga por ke mi restu. Do mi decidis fari tiun ekskurson, des pli volonte, ke la urbo Wien estis survoje, preparante malferman feston de la Zamenhofa Muzeo.

LA ANTAŬKONGRESO EN WIEN.

Estis vere unika okazintaĵo por ni Esperantistoj, ke tiom grava persono, la Prezidanto de la Stato bonvolis honorigi nin persone inaŭgurante la Muzeon. Vere granda kaj grava propagando.

Solena inaŭguro de la Esperanto Muzeo Internacia la 1-an de aŭgusto sekvis post la aŭdienca akcepto de eminentuloj Esperantistaj en la palaco de Ballhaus. Prezidanto de la Aŭstria Respubliko s-ro Wilhelm Miklas kun ministroj ka altranguloj ĉeestis la inaŭguron, en la bela salonego de la Nacia Biblioteko. Alparolis kaj salutis ĉeestantojn la Direktoro de la Biblioteko. Poste parolis, plej merita samideano, s-ro Hugo Steiner, kies laboroj kaj klopodoj por la Muzeo restos

por ĉiam neforgeseblaj. Estas menciinde, ke li estis honorigita per la titolo de registara konsilanto. D-ro Sos estis unu el plej malavaraj donacintoj oferinte al la Muzeo la bibliotekon enhavantan 700 librojn. Sekvis ankaŭ malavara donaco de altŝatata pioniro de Esperanto samideano Prof. Schade, kaj multaj aliaj. Ĉiuj Espertantistoj devas de nun kompletigi la Muzeon laŭ siaj fortoj.

Antaŭ la inaŭguro de la muzeo la 31-an de aŭgusto estis aranĝita de nia pola samideano d-ro Róbin el Warszawa kune kun kelkaj vienanoj la kunveno de Tutmonda Esp. Kuracista Asocio. Ĝi okazis en la salono de la Ĝenerala Malsanulejo. Malfermis s-ro d-ro Sos nia delonge konata meritplena samideano. Dum la vigla diskutado partoprenis tre lerte s-ro d-ro Sianożęcki el Katowice. Tre instrua kaj interesa estis la prelego de Prof. Neuburger, bedaŭrinde ne en esperanto. Ni vizitis tre interesan Medicinan Muzeon de s-ro prof. Neuburger, kie ni vidis la bildojn de multaj eminentaj kuracistoj. La mankantantan bildon de pola profesoro Chałubiński mi sendis antaŭ kelkaj tagoj al la dirita muzeo.

Al Budapeŝto ni faris agrablegan traveturon de la Danubo persipe. La vetero estis dum preskaŭ tuta tempo klara, iomete nur de tempo al tempo nubema. La barometro antaŭdiris iun ajn ŝanĝon, pro tio mi estis suspektema kaj ne sidiĝis sur la malkovrita parto de la ŝipo. Post unu horo pluvis terure kaj ĉiuj forkuris de la supra parto malsupren en la kabinojn severe malsekiĝintaj. Sed post kelkaj minutoj ree ni sidis sub la sunradioj kaj babilis.

Tiu kiu opinias, ke la Danubo estas blua treege eraras. Mi jam delonge konas la Danubon, neniam tamen vidis ĝin blua. Tio ne malhelpas, ke la vojaĝo sur la Danubo estas tre agrabla kaj rekomen-dinda precipe somere, kiam en la vagonaro la temperaturo estas ne tolerebla.

Alproksimiĝante al Buda-Peŝto ni haltis kelkan tempon apud la Esztergom baziliko: malnova belega tre interesa arĥitektura konstruaĵo. Mi bedaŭris ne povante pli detale ĝin pririgardi. Sekvas Viŝegrad, al kiu ni poste revenos dum la ekskurso. Jam fariĝis nokto, kiam ni alvenis Budapeŝton. Mi facile trovis bonan ne multe kostan hotelon kaj bone dormis, ne partopreninte la interkonatiĝan vesperon. Oni ne povas diri ke esperanto estas tre disvastigita en Hungarujo, oni multe parolas germane, malmulte france.

La 3-an de aŭgusto s-ro d-ro Georgo Lukas, eksministro por kulto kaj publika instruado malfermis la Someran Universitaton. Li parolis esperantlingve kaj konstatis, ke tiu-ĉi lingvo estas la plej perfekta solvo. Li diris ankaŭ, ke la lingvo internacia servas al la reciproka interkompreno de la diverslingvaj nacioj kaj popoloj: nur en paca tempo seriozaj interrilatoj estas eblaj kaj povas kreski artoj kaj sciencoj, al kio servas nia somera universitato. La pacifismo ne estas kontraŭa al la ideo de patriotismo, sed kompletigas ĝin. Ĝi signifas universalan homamon. Kiu vere amas sian patrujon ne povas malami aliajn. La someraj universitataj prelegoj akcelas, ke eminentuloj de la scienco liberiĝu el la baroj de la diverslingveco por la diversnacia aŭdantaro.

Budapeŝto estas la kvina stacio post la jam okazintaj en Genevo, Edinburgo, Dancigo kaj Antverpeno. D-ro L. Lorand vicprezidan-

to, anstataŭante dum la foresto la honoran Rektoron prof. Kiss, prezidas. Prof. Kanuto faras interesan prelegon pri la Historio de la Jurmedicino. Sekvantan tagon parolas tre interese s-roj Törer kaj Behrendt pri la televido kaj pri la longdistancaj kabloj. Ambaŭ meritas detalan priskribon en Scienca Revuo. Kiel prorektoro funkciis prof. O. Bujwid.

La malferma kunsido okazis en la belega palaco de la Reduto (Vigado) unu el plej belaj konstruaĵoj, kiun ni esperantistoj ĝis nun povis disponi. Estas necese rimarki, ke Budapesto en tiu rilato estis plej gastema el ĉiuj aliaj ĝis nun nin gastintaj urboj. Vere ni devas konstati, ke Budapesto komprenis indecon de la mondlingvo. Rakoczi marŝo sonis en tiu grandioza salonego tute speciale triumfe, dum la junaj skoltoj staras antaŭ la podio kun esperantaj kaj hungaraj flagoj formante longan ŝpaliron. Skoltoj parolis esp. sufiĉe bone kaj estis tre helpemaj al la esperantistaro dum la tuta Kongreso. Hungara himno post la Rakoczi marŝo vole ne vole memorigis al ni kruelan postmilitan sorton de Hungarujo.

S-ro Schoofs, la prezidinto de la pasinta Kongreso proponis kiel prezidanton s-ron prof. I. de Michalik, vicprezidantojn: d-ron Lorand, Carlos Domingues (Brazilo), Boutwood (Anglujo), kolonelon Silvestriev (Bulgarujo), Gueritte (Francujo), Behrendt (Germanujo), Ĉen (Ĉinujo), Sakurata (Japanujo), D-ron Fel. Zamenhof (Polujo), Princon Carlo (Svedujo), Ĝen. Sekretar.: R. Kreutz kaj P. Tolnai, Sekretariojn: Balkanyi, A. Tolnai; Vicsekr.: S-inon E. Benczen-Szekely; Asistantojn: J. Baghy, L. Kökeny, Kovats, Szasz, Zöldy.

Prezidanto Michalik salutis la ĉeestantaron je la nomo de la LKK. Tuj poste eksonis la Esper. himno, kaj la jam de longe konata nia esperanta poeto Julio Baghy, deklamis sian belan, profundsentan poemon:

AL NOVA BORDO.

Post himnoflugo la orgen' silentas,
sed koraj kordoj vibras plu solene...
Pri vojkomenco rememor' legendas,
Espero pri l' estont' nin regas plene.
Post jara drivo por ripoz' rigardo
jen nia ŝip' atingis novan bordon...
Okuloj brilas, flirtas la standardo,
kun Nova Sent' ni petas novan forton:

Ho Amo, vin ni vokas al la korol
Nin superombru via bona graco
dum inspiritaj horoj de l' laboro,
dum la semad' de l' intergenta pacol
Sub sunkareso la semaĵo ĝermas...
Vi, nia sun', karesu koran humon!
La varmon ni en ni dankplene fermas
por havi fruktojn: Belon, Bonon, Lumon.

Post halt' momenta kaj labor finita
ekiru nia ŝip' al nova bordo...
Tra ondoj, super rifoj saĝo spita
direktu ĝin al certa bona sortol
Okuloj brilu, flirtu la standardo,
favora vento ŝvelu ĝian velon,
admonu nin konstante kora ardo:
Gefratoj, ni atingos nian celon!

Malferma kunsido estas ĉiam plej valora momento el ĉiuj aliaj de la esp. Kongresoj. Sed niaj hungaraj samideanoj preparis por ni ĉiuj novajn, neniam forgeseblajn mirindaĵojn, kiuj restos en nia memoro, ĉiam dankema por la vere kora sentemo hungara.

Post la parolado de la oficiala delegito de la hungara Registaro s-o ministr. konsilanto barono Kazy, sekvis la salutparolo de s-ro vicurbestro d-ro Berczely. En la nomo de virinoj hungaraj salutis esperantlingve s-ino Réthey: „kun la sincera amo de mia virina koro mi salutas vin, antaŭ ĉio la virinojn, kiuj estas destinitaj al flegado de l' amo. Forgesu la malbonon diritan pri Hungarujo, memoru nur bonon!“

Sekvas salutparoloj de la reprezentantoj de eksterlandaj registaroj. Unuavice nia ŝatata samideano el Brazilo s-ro Carlos Domingues, komparas sian grandegan brazilan riveron, Amazonon kun la Esperanto-movado. Ni ne citos ĉiujn parolintojn, sed mencios kelkajn ekz. ĉiam spiritan samid. Isbrücker, kiu rakontis la anekdoton pri la reĝo Karlo V-a. Ne al ĉiuj ĉeestantoj eble plaĉis la anekdoto, sed ĝi ne estis la opinio de s-o Isb. sed de la tiama Imperiestro. Li diris, ke laŭ la eldiro de la reĝo, „hispane oni parolu al dio; itale al artistoj; angle al anseroj; germane al soldatoj; hungare al ĉevaloj; ĉeĥe al diablo. Se tiu reĝo ankoraŭ vivus, li dirus sendube, ke esperanton oni parolu al prudentaj homoj. Budapeŝt estas nuna ĉefa urbo de Esperantujo, kie la suno ne subiras, kiel en la regno de tiu hispana reĝo“. Por Usona ŝtato Michigan parolis s. Jaffe, speciale por tio delegita. Sekvis la salutparoladoj de la naciaj delegitoj el 30 diversaj landoj. En la nomo de Pollando salutis Prof. Bujwid, kiu ankaŭ parolis en la nomo de la ĉeestanta reprezentanto de la pola ministerio de la poŝtoj kaj telegrafoj. Ministro Boerner estas tre simpatiema al esperanta movado de ILEPTO.

La saman tagon okazis kelkaj kongresoj specialaj: blinduloj, ILEPTO, Paneŭropo.

Dimanĉe 4-an de aŭgusto S-ino Isbrücker inaŭguris la standardon de la Hungara esper. Societo. „Kun la interna ideo, staras aŭ falas nia movado. La Standardo instigos al vi, novan forton por la esperanto movado“.

S-ro Merchant, prezidanto de ICK malkovris la tabulon por la memoro de la grafo Szechenyi. Posttagmeze okazis por invititaj personoj (korespondantoj de ICK) tekunveno en hotelo Continental, aranĝita de nia ŝatata prezidanto s-ro Merchant. Vespere okazis kostumbalo kaj estis elektita Miss Esperanto, estona blondulino, Veronika Eksta, loĝanta en Tallin. Okazis kelkaj tre interesaj naciaj dancoj. S-ro Fel. Zam. faris himnon al la Miss esper., kiun jam konas la legantoj de Pola Esperantisto (n-ro 7-a).

Ĉu inter tiom da amuzaĵoj mi ne forĝesis paroli pri la laborkunsidoj: Lundoŝ la 5-an de aŭg. parolis nia samideano L. Krysta pri vere grava temo: Elparolado de Esperanto. En la vigla diskutado partoprenis inter aliaj: Lydja Zamenhof, Warden, Jung, Kreutz, Isbrücker, Behrendt. Pri Radio kaj parolanta filmo parolis inter aliaj ankaŭ Lydja Zamenhof. F-ino Glaser prezentas s-inon Uppman kaj f-inon Solländer premitajn okaze de speciala esperanta kurso en Berlin.

Mi devas priparoli ĉi-tie vere kortuŝan ceremonion por la memorigo de la prelato Giesswein, kiu okazis antaŭtagmeze ĉe la tombo de tiu konata de ni kaj altŝatata samideano. Ni ĉiuj partoprenintoj je la oka Kongreso en Kraków memoras gaje aspekton, belan vizaĝon de la persono de altvalora interna kulturo kaj vere homarana sento. En la nomo de polaj samideanoj prof. O. Bujwid almetante florkronon elparolis mallonge kelkajn memorvortojn. Oni proponis starigi la monumenton sur la tombo kaj oni faros monkollekton (ankaŭ en la Redakcio de Pola Esp-o Kraków).

Pri la kursoj de s-ro Andreo Ĉe parolas aliloke la partoprenantino f-ino Weinstein. Ni devas ankoraŭ mencii treege interesan speciale por poloj, ekskurson al Viŝehrad sur la Danubo. Tie estas memortabulo pri la forveturo de la Hedvigo (Jadwiga) pola reĝino, filino de la Ludoviko, hungara reĝo, al Kraków en la jaro 1383. Imponaj estas la restaĵoj ĝis nun bone konservataj de la kastelo, ejo de tiom gravaj rilatoj de polaj kaj hungaraj reĝoj.

Oni ne povas preterpasi ankoraŭ la kunvenon de la Intern. Scienca As. Esp., kiu okazis sub la organizo de s-ro prof. d-ro Gyula Rakusz. Oni decidis eldoni kiel eble plej baldaŭ, la antaŭ la milito tiel bone prosperintan Sciencon Revuon. Pri la detaloj ni parolos poste.

La teatra prezentado en la Budapeŝta teatro kaj la koncerto de Blinduloj en la muzika Akademio devas esti aliloke priparolotaj.

En la nuna numero oni trovos multajn detalajn priskribon de la Kongreso kiuj pruvas pri valoraj memoraĵoj de ni elportitaj el tiu belega, kultura urbo Budapeŝt. Certe ili restos longe en nia koro kaj memoro.

O. Bujwid.

III. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.

(Poznań, la 29.—30. VI. 1929).

Pollanda Ekspozicio Ĝenerala en Poznań estis sufiĉe forta allogaĵo por multaj samideanoj por venigi ilin al la ĉefurbo de Grandpolujo. Ariĝis en salono de La Universitato esperantistoj el ĉiuj partoj de la lando en la nombro ĉirkaŭ 150 personoj. Prof. Nowakowski en nomo de la Loka Komitato bonvenigis la ĉeestantojn, transdonante la prezidon en la manojn de Prof. Bujwid, kiu malfermis la kongreson. En la nomo de P. E. Ĝ. salutis la kongreson s-o ĝen. sekretario Krzyżankiewicz, kiu deziris sukcesan laboron.

En la kadroj de la kongreso okazis IV. Konferenco de P. E. D., kies laborkunsido okazis posttagmeze de la 29. VI. Partoprenis ĝin 14 delegitoj de 8 grupoj. Krom ili ĉeestis multaj aŭskultantoj, kiuj kun intereso sekvis la raportojn kaj diskuton de la delegitoj. Post raportoj de la ĝen. sekretario s-o Alfus pri financa stato kaj laboroj de la Ekzekutiva Komitato dum pasinta periodo ekiĝis vigla diskuto pri malfortaj flankoj de la organizo kaj kaŭzo de tio nesufiĉe sukcesa laboro. En la diskuto partoprenis s-oj: Dratwer, Gerlich, Sapiro, d-ro Dreher, Lejzerowicz, prof. Nowakowski, Litauer.

Oni ne akceptis proponon de d-ro Dreher, ke oni proponu al I. C. K. aranĝi ĉiun duan jaron Universalan Kongreson kaj intertempe landajn kongresojn.

Oni akceptis la proponon de s-o Litauer, ke la E. K. organizu la distriktan movadon.

Estis akceptita ankaŭ propono de s-o Litauer, ke la Plena Komitato konsistu nur el 6—7 personoj kun rajto koopti aliajn necesajn personojn.

Dum balotado estis elektitaj: Prof. Bujwid (prezidanto), prof. Nowakowski, prof. Ułaszyn (Poznań), d-ro Czubyński (Garwolin), inĝ. Tor, d-ro Dreher, Alfus kaj s-ino Weinsberg (Kraków).

La dua tago estis destinita por vizitado de la Ekspozicio, kiu faris imponan impreson sur la vizitantoj. La tuta tago ne sufiĉis por viziti ĝin bone. Tial multaj personoj restis ankoraŭ unu tagon por vidi ĉion. Vespere okazis la ferma kunsido de P. E. D. kaj ankaŭ fermo de la kongreso. El la diskuto dum tiu ĉi kunsido estas citinda okazigo de la Universala Kongreso en Pollando. Estis starigitaj 2 proponoj: 1) okazigi la Kongreson en la jaro 1937 kiel jubilea, kiun oni principe akceptis, akceptante ke la dato estas tro malfrua, 2) okazigi la Universalan Kongreson en la jaro 1931, kiun oni akceptis. Oni diskutis ankaŭ pri loko de sekvonta landa kongreso, sed la decidon oni lasis al la E. K.

Kun la vortoj: „Ĝis la revido“ oni foriris.

LA KONKLUDOJ EL STATISTIKO.

KONGRESA PAROLADO.



Samideano Dietterle faris al ni statistikon de la kuranta stato de nia movado. En 1928 estis 126.508 esperantistoj, pri kiuj ni havas fidindan sciigon. Kalkulante tion kompare kun la loĝantaro de nia lando, oni povus proksimume diri, ke per monda esperantistaro oni povus loĝatigi nian Sosnowiec kun iu proksima urbeto. Ĉu tamen efektive estas nur tiom da esperantistoj en la mondo? Verŝajne ne. Ĉar kalkulante laŭ la nombro de forvenditaj lernolibroj oni povus diri, ke estis jam kelkaj milionoj da libroj forvenditaj. Sekve, se ni supozus, ke eĉ ne ĉiu libreto havus influon, tamen malgraŭ ĉio la cifero de esperantistoj estus pli granda, ol la cifero, kiun ricevis nia laborema samideano germana. Lia cifero tamen montras certe la plej aktivajn esperantistojn, la esperantan eliton.

Sed ni laŭ tio provu konkludi: post 40 jaroj de la agado ni ricevas fidindan ciferon 126.508. La loĝantaro de nia lando kalkulas pli malpli, en rondaj ciferoj 30 milionojn da homoj. Ni forkalkulu de tio eble unu trionon da homoj tro junaj, aŭ tro maljunaj aŭ aliaj, je kiuj oni ne povas sin apogi. Restos 20 milionoj. Laŭ la statistiko de nia pola ĉefdelegito Jakób Szapiro en Białystok la 1. de junio 1929 ni kalkulis en Polujo 368 membrojn de UEA. Kiom multe da tempo oni bezonus por esperantigi 20 milionojn, eĉ akceptante, ke ne ĉiu esperantisto estas UEA-ano.

El tio ni povas klare vidi, ke nia ĝisnuna sistemo de propogando atingos neniam la celon esperantigi la homaron, se ni ne ŝanĝos la ĝisnunan taktikon aldonante al ĝi la novan: la agadon pere de la registaro enkondukanta kiel devigan lernobjekton esperanton en la lernejoj.

Longaj estis tiuj-ĉi penadoj de 1922 jaro, kiam mi unuafoje proponis, ke la ŝtatoj subskribu la akordon enkonduki esperanton en la lernejoj samtempe, se aliaj la saman faros. Ne pli frue, kaj ne pli malfrue ol aliaj pri la samo konsentos. En 1922 ni opiniis realigi tiun proponon pere de Ligo de Nacioj, poste en 1927 jam oni ne postulis, ke estu 10 ŝtatoj necesaj, sed nur 6, kaj nia agema samideano Privat gvidis la tutan agadon senlace kaj kun mirinda zorgemeco en diplomataj sferoj. Favora estis jaro 1926, kiam 3 ŝtatoj estis jam varbitaj por tiu-ĉi ideo. Sed kiam oni alpaŝis al la kvara la kabinetoj de ministroj falis kaj kun ili la tuta afero, kiun oni devis komenci denove. Favoraj por tiu-ĉi ideo estis polaj ministroj en unua duono de 1928. Intertempe okazis gravaj aferoj, kiuj fortiris la atenton de la diplomata agado. Oni komencis fosi sub nia E. Privat kaj malkuraĝigis tiun ageman samideanon. Kiu gvidos plu la agadon inter diplomatoj? Ne sufiĉe favora situacio politika prokrastas ankaŭ la rekomendon.

Kion do plu fari? Rezigni de la agado interregistara? Tion oni ne povas fari! Ni trastudu la supre montritajn ciferojn! Kiu farinte tion ne ektimos kaj ne nebuligos la frunton per ĉagrenoj pri la estonteco de nia movado. Ni eksciu fine, ke tiel nomataj „grandaj sukcesoj“ en nia movado, konsistantaj el varbo de kelkaj dekoj da novaj adeptoj ne estas sukcesoj, ĉar samtempe malaperas multe da akiritaj esperantistoj, kiuj de nun fariĝas „iamaj esperantistoj“. Kia nova Dietterle faros al ni statistikon de malaperintaj esperantistoj? Certe la nombro de ili multe pligrandigus la ciferon 126.508! **Per la ĝisnuna agado ni neniam sen helpo de la registaro atingos la celon.**

Kion do fari?

1) Unue seniluziigi samideanojn pri fruktodoneco de nura ĝisnuna taktiko. Ĉiu reformo, kia ajn ĝi estus, komencadis de ekkompreno de eraroj, aŭ mankoj. La agantoj esp. devas antaŭ ĉio montri apogante sin je statistika bazo, laŭ supre montrita principo, en diversaj landoj, ke per tio ni scipovus esperantigi la homaron, se la agado ĉiam restos la sama, **nur post kelkaj miloj da jaroj.** Se do pri tio oni konsentos kaj ekkomprenos la danĝeron, oni ĉesos ĉiam rozkoloro pripensi pri estonteco esp. La 41 jara movado devas havi pli da fortoj ol nia ĝisnuna. Ni ekkomprenu kiel grandega, kiel senlaca, kiel oferebla estis la laboro de ĝisnunaj pioniroj! Kaj kia sekvo? Tralegu la diskuton en bavara Parlamento, la diskuton, kiu kun ne tro grandaj ŝanĝoj ripetigis certe ankaŭ alilande. Kiajn stultajojn oni aŭdis pri esperanto! Post 40 jaroj da senlaca agado!

2) Ekkompreninte la situacion ni komencu varbadi por la ideo de interŝtata akordo. Oni grandege eraras opiniante, ke niaj samideanoj, pro tio, ke ili estas samideanoj, jam ĉion necesan komprenas. Ili venas al la societoj kaj esp. kluboj por danci, amuziĝi, eĉ ne ĉiam esperante babiladi. Al ni, kiel fundamentan postulon, malgraŭ ĉiuj murmuroj kaj ridetoj, ni enŝovu kiel ĉefan nian ideon kaj alvokon, ke sen

akordo interŝtata nia movado ĉiam restos movado de grupetoj, neniam de nacioj kaj de la homaro.

En ĉiu nacio la socio dividiĝas je partioj. Sekve ni devas varbi por la ideo de akordo la **partiojn**, ĉar iliaj reprezentantoj decidados en parlamentoj pri akordo. Sen tio niaj penadoj estos kvazaŭ kreskaĵoj sen radikoj. En decida momento la parlamentanoj respondos: ni ne povas decidi pri aferoj, kiujn ni ne konas. Tiel oni respondis en sveda parlamento. Sed tiam niaj svedaj samideanoj ekkomprenis, ke oni devas fondi inter ili kurson, ĉar sen kono de la lingvo, ekkompreno de nia ideo neniam povas esti klara kaj plastika sufiĉe. Do ni varbu la partiojn por la ideo, por ke ni lastamomente ne estu forlasitaj de la gravaj personoj, sed ne sciantaj kion opinii pri esperanto.

3) Post tiuj-ĉi du demandoj ĝis nun malzorgitaj en la ĝisnuna movado, ni klopodu pri la pli gravaj kaj pli komplikaj. Oni ne povas postuli de unu samideano, se li estus eĉ plej talenta kaj plej meritoplena, ke li sola ĉion faru. Eĉ Zamenhof malgraŭ lia grandega laboro ne scipovis krei sola movadon esp. ĉar por tiu-ĉi celo ne sufiĉas unu homo. Kreo de movado neniam dependas de unu homo. Ĝi estas produkto de multo da agantoj. Simile ni povus ion sukcesi, se ni kreus en ĉiu lando **specialajn komitatojn** zorgantajn pri preparo de la akordo. Ili devus esti submetataj al Centra Komitato, sed neniam CK scipovos prepari en ĉiuj landoj tion, kion povas en ĉiu lando prepari aparta grupo per komuna laboro.

Tiamaniere, se ni havus certan bazon, por nia agado en decida momento ne estu riska, ni povus tiam pli certe alpaŝi al decida periodo.

Sed la landoj, kiuj devus esti varbitaj al la ideo de la akordo, ne povas esti disĵetitaj geografie, sed kunblokitaj sur pli-malpli proksima teritorio. Aliokaze ilia alpaŝo al la akordo estus sen tro granda influo. Oni povus esperi, ke tiuj-ĉi landoj estus mezeŭropaj, de Finnlando ĝis Grekujo, ĉar tie regas la plej granda diverseco de lingvoj, kiu en okcidento ne estas tiel turmenta, ĉar la lingvoj de okcidento estas alilande pli konataj, ol mezeŭropaj.

Sed oni povus ankaŭ alimaniere antaŭvidi disvolviĝon de la demando. Ne la mezeŭropaj ŝtatoj, sed la Ameriko estos la donanta iniciativon al realigo de nia ideo. Sen Usono nenio granda estas farebla. Tiu-ĉi mirinda ŝtato donis per siaj eminentaj spiritoj iniciaton al plej grandaj sociaj reformoj, havantaj signifon ne nur interne de la ŝtato, sed sur la tuta terglobo. Al ĝi, al granda Wilson, ni ŝuldas realigon de la ideo pri memdifino de la nacioj, unuafoje en la historio de la homaro pritraktata ne kiel sonĝo, sed kiel direktivo de politiko, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj estas forŝoveblaj nur en la daŭro de longa tempo. En Usono oni enkondukis la ideon de kontraŭalkohola batalo, malgraŭ ĉiuj malkontentoj de alkoholemaj adeptoj, kaj malgraŭ protestoj de personoj, kiuj pro nunmomentaj perdoj kaj malfacilaĵoj postulas revenon al antaŭa ŝtato. Al Usono la mondo ŝuldas dankon pro obstina propagando de la ideo pri senarmigo, pri pakto de Kellog. Jen la ideoj, pri kiuj diversaj skeptikuloj movas la ŝultrojn kaj ridegas. Sed ni pritraktu tiujn-ĉi ideojn el pli longa tempdaŭro. Ĉiu ideo por efektiva realigo postulas longan laboron; facile do estas citi nun-

momente malprogresojn, malsukcesojn, rideti kaj kapmovi. Sed alie aperos tiuj-ĉi ideoj post unu kvindeko da jaroj.

Se do tiu-ĉi reala, negocema popolo scipovis per siaj eminentaj spiritoj doni tiel imponan iniciaton, kiu scias, ĉu ĝi ankaŭ ne sukcesus en ideo pri interŝtata akordo esperanta. Oni ja diras, ke en tiu-ĉi granda lando, oni klare ne komprenas necesecon de alia lingvo ol angla, kiun oni povas ĉie kompreni, sed eble alimaniere pensas ne la amasoj, sed la eminentaj spiritoj de tiu lando. La supre cititaj pensoj ne ĉiam trovis akcepton ĉe la amerikanoj mem. Ili estis prefere produkto de amerika politiko kaj praktika spirito ilia, ol senpera bezono kaj neceseco de la amerikaj amasoj, ofte tre mallonge vidantaj kaj kontraŭbatalantaj la ideojn de iliaj gvidantoj.

Se ni estus akirintaj la parlamentojn, tiam la ministerioj estus pli favoraj al la ideo pri akordo. Sed la ministroj ŝanĝiĝas, ministerioj tamen daŭras. **Decida estus do opinio de la ministerio, ne nur de la ministroj.** Se ĝi estus unu foje jam eldonita, kaj subtenita de la parlamentanoj, tiam pli facile estus jam citi ĝin en alia lando kiel komencon jam faritan kaj instigi parlamentanojn de tiu-ĉi nova lando por la decido analogia.

Sed la danĝero en tiu-speca agado ripozas en tio, ke rompiĝas la samtempeco de la decidoj, kio tre malfaciligus la decidadon. Tial kvankam preparado devas daŭri pli longan tempon, tamen kolektado de la fruktoj de tiu-ĉi decido devus okazi dum pli-malpli sama epoko. Se antaŭe ne sukcesadis tiu-ĉi agado la kaŭzo de tio estis, ke ni tro rapide, sen speciala antaŭa zorgema preparo inter parlamentanoj volis, ke la reprezentantoj de la nacio decidu pri demando, por kiu ili, kiel oni trafe diris en sveda parlamento, ne estis preparitaj.

Nur tia maniere ni povos sukcesi. Tio, pri kio mi ĉi-supre skribas estas nur skizo. Mi povus prepari specialan broŝuron pri la demando, sed mi opinias, ke ĉi artikolo por spertaj propagandistoj jam sufiĉas. **LA LABORO POVAS ESTI NUR KOMUNA, SE ĜI DEVAS GVIDI AL BONAJ REZULTOJ.** Ni ne dependigu la aferon de unu persono, kiu povas malsaniĝi, morti, au simple enuiĝi, elĉerpiĝi per ne ĉiam tuj sukcesplena laboro.

Sed, se eĉ realigo de niaj celoj postulus pli longan tempon, ol ni povas antaŭvidi tamen la vojo, kiun mi montras ŝajnas al mi sole reale gvidanta al favora fino de nia ĝisnuna laboro.

Dr. Antoni Czubryński.

ĈE-KURSO EN BUDAPEŜT.

De longa tempo mi multe legis en esperantaj gazetoj, ke Andreo Ĉe instruas esperanton sen lernolibroj, sen uzo de nacia lingvo kaj sen hejma laborado.

Mi estis tre scivola, kiamaniere tio povas okazi, kaj mi ĉiam pensis kiam venos la momento, en kiu mi povos ekkoni la faman metodon de Andreo Ĉe.

Mi estas optimistino, mi rigardas la estontecon per hela okulo kaj ĉiam kredas, ke ĉiu mia revo efektiviĝos.

Ĉu vi pensas, ke estis alie en tiu-ĉi okazo?

Ne.

Aŭdu, aŭdu!

Iun vesperon venis al mi samideano kaj montris junian numeron de „Heroldo de Esperanto“, kie troviĝis ĝojiga sciigo:

„La Ĉefurba Pedagogia Seminario de Budapeŝt en kunlaboro kun la Instituto Jean Jacques Rousseau de Genevo decidis organizi internacian esperantan kurson por ĝeinstruistoj sub gvidado de Andreo Ĉe.

La kurso daŭros dum 11 labortagoj de la 22 julio ĝis 2 aŭgusto 1929 kun 4 lernhoroj ĉiutage. La Urbestro de la hungara ĉefurbo Budapeŝt subvencias la kurson... k. t. p.“

Mi rapide ĝin tralegis, kaj tuj kuris al poŝtoŝtanco sendi la depeŝon, ke mi aliĝas al la kurso.

Poste mi revenis hejmen kaj skribis pli detalan leteron al L. K. K. en Budapeŝt.

Pasis kelkaj tagoj, mi ricevis la necesajn dokumentojn kaj la afero estis finita.

Malpacience mi atendis la 20-an de julio, la tagon de mia forvojaĝo.

Kiam mi atingis la hungaran landlimon en Szob, mi montris la pasporton sen vizo kaj la kongresan karton.

Tuj oni venigis al mi hungaran oficiston, kiu parolis pole kaj kiu tre afable helpis min prizorgi la pasportajn aferojn.

„Se ĉiuj hungaroj estos tiel afablaj, estos bone“ — mi diris al mi mem. Kaj vere mi ne eraris. La hungara popolo estas tre ĝentila, tre afabla kaj tre kora.

Post unu horo ni veturis antaŭen. Kaj finfine la vagonaro haltis en Budapeŝt. Kiel mi ĝojis en tiu-ĉi momento, kiel mi estis feliĉa!

En la stacidomo atendis min hungaraj samideanoj kaj inter ili mi ekvidis la bonan vizaĝon de konata al mi Paŭlo Tolnai, kiu prezentis al mi tuj tre simpatian hungarinon Elisabeton B. Székely.

Malgranda samideano János Wolff elegante prenis mian sufiĉe pezan valizon kaj ni ĉiuj kune (venis ankoraŭ kelkaj eksterlandaj gastoj) veturis al „Domo de l' Instruistoj“.

Oni lokis min en bela, granda ĉambro kune kun du hungarinoj, kiuj ne sciis eĉ unu vorton esperantan.

Estis ridinda nia interparolo: kelkajn vortojn germane, kelkajn vortojn france kaj poste... per gestoj kaj mimiko.

Mi iris dormi, ĉar mi estis terure laca, ja la vojaĝo de Warszawa al Budapeŝt daŭris 22 horojn per rapidvagonaro.

Kiam matene mi malfermis la okulojn, mi ekvidis, ke sur la litranketo troviĝas tri glaso kaj surskribo „Esperanto. . Budapest. 1929“, kaj tri pecoj da bonodora sapo ankaŭ kun surskribo „Esperanto“.

Mi rigardis la du hungarajn fraŭlinojn. Kio ĝi estas?

Per gestoj ili diris al mi, ke tio estas por ni.

Mi komprenis. La organizantoj de la kurso donacis por ĉiu kursano la glason kaj la sapon por memoro.

Vere, tio estis tre agrabla surprizo por ni.

La malfermo de la kurso okazis la 22-an de julio je 9-a horo matene en pedagogia Seminario de Budapeŝt.

La granda ĉambro, kie ni ariĝis, estis ornamita per esperantista standardo kaj per flagoj de la ŝtatoj reprezentataj. La ĉambro plena: 152 personoj.

Malfermis la kurson Jozefo Mihalik hungarlingve kaj esperantlingve, sekvis poste salutoj de kelkaj gravaj personoj kaj fine parolis Andreo Ĉe, dirante, ke la unuan fojon en sia vivo li montras publike sian metodon antaŭ instruistoj de 12 nacioj. Poste li atentigis la aŭdantojn, ke ili ne aĉetu lernolibrojn, ĉar dum 11 tagoj ne estos lecionoj sed konversacioj. Oni devas paroli nur forte, kuraĝe, elegante kaj esperante.

Ni tuj komencis la konversaciojn.

Kiel ili estis interesaj! Andreo Ĉe instruas eksterordinare. Li montras ĉiujn regulojn kun tiel granda humoro, kun tia vigleco, ke ni ĉiuj ridis, ni laŭte ridis.

Pri gramatiko li diras nenion (tio ja ne estas lecionoj, sed konversacioj!), sed li montras al ni kvazaŭ grandan ĉenon, kies ĉeneroj estas artece kunligitaj.

Kiam li demandas, estas neeble fari eraron, ĉar en demando troviĝas jam respondo. Kiam li skribas ian novan regulon sur tabulo, li intence faras erarojn, kaj la aŭdantoj mem korektas ilin.

Tio estas tre bona metodo, ĉar tiam la lernantoj pli bone atentas. Mi memoras kun kiel granda ĝojo la komencantoj korektadis Andreon Ĉe, kriante: „Malbone vi skribis, malbone“.

Estas neeble en tiu-ĉi artikoleto priskribi la tutan kurson, mi povas nur diri, ke ĝia rezulto estis grandioza.

Inter ni parolis esperante 50 personoj, la ceteraj ne sciis eĉ unu vorton. Kiam la kurso finiĝis, ili ĉiuj parolis kuraĝe Esperanton. Kiel mi jam skribis, mi loĝis kun du hungarinoj, kiuj ne sciis Esperanton. Unu el ili estas Irma Mohalyi, kun kiu mi povis interkompreniĝi tute bone esperante jam en la unuaj tagoj de la kurso.

Ni interparolis, ni ŝercis kaj ni tre ridis.

Unu vesperon ni tre laŭte ridis kaj estis jam sufiĉe malfrua horo. Ni estis en bonegaj humoroj. La fenestroj estis kiel kutime malfermitaj. Subite aŭdiĝis severa vira voĉo: „Ni petas la silenton. Ni volas dormi“. Morgaŭ matene oni pendigis sur la pordego anonceton, ke vespere oni ne devas laŭte paroli kaj ridi, ĉar multaj personoj volas dormi.

Estis ridinda afero, ĉar kelkaj personoj turniĝis al mi kun diskreta demando: „Ĉu vi skribis tion? Diru la veron“.

Mi ridis, sed mi neis, ĉar vere mi tion ne skribis.

Nun mi diras la tutan veron: mi estas la kulpulino, kiu ridis tiam tiel laŭte (fraŭlino Irma pli mallaŭte), kaj kiu parolis tiel laŭte kun fama Sinjoro Pedagoĝo.

Pardonu al mi, ĉiuj gekolegoj el „Domo de l' Instruistoj“, ke mi malhelpis al vi unufoje dormi bone en Budapeŝt kaj sonĝi eble pri belaj hungarinoj kaj hungaroj.

Halina Weinsteinówna.

Warszawa, en aŭgusto 1929.



„PAĈJO BEM“.

Okaze de antaŭnelonga solena transporto de l' korpo de gen. J. Bem sur la polan teron kaj pro la intereso vekita de la XXI-a kongreso en Budapest ni opiniis taŭga ĉi suban historian skizon.

Kiel torentoj de karpataj akvoj disfluas ambaŭflanken de tiuj ĉi montoj, tiel disvastiĝas la kanto pri „Patro Bem“, tie super Danubo kaj ĉi tie super Vistulo; la kanto de kavalira rapsodio pri gloro de niaj prapatroj.

La persono de generalo Bem luma kaj senmakula kiel kristalo, reprezentas ĉe ambaŭ nacioj — pola kaj hungara — tiujn momentojn de historia pasinteco, kiam ili batalis kun superforto pri sia sendependeco. Generalo Bem estas standard-portinto de libereco por ambaŭ naĉioj:

Kiam Polujo falis sub batoj de politika rabo, kiam falis insurrekcio *), Bem, kiel siatempe Kościuszko kaj Pułaski por libereco de Ameriko, iris batali por libereco de Hungaroj. Tial do, kiel Usono Kościuszko'n — heroon de bataloj por sendependeco de Polujo kaj Ameriko, honoras generalon Bem Hungaroj, nomante lin sia „Patro“, kaj kiel pruvo de enkalkulo lia al Panteono de siaj „Reĝoj-Spiritoj“ oni fiksis al lia ordeno diamanton, prenitan el nacia sanktaĵo, kia estas la krono de Sankta Stefano, kaj sur ĝia loko oni metis surskribon: „Józef Bem“.

Kaj vere Bem — jen perlo en historio de l' ambaŭ nacioj, vivantaj en ĉiama konkordo.

Józef Bem devenis de antikva familio nobelula, kaj lia patrino de eminenta familio de Gołuchowski. Lia patro estis advokato en Tarnów kaj Kraków.

Naskita 13 de marto 1794 en Burek apud Tarnów, Józef pasigis sian junecon en Tarnów kaj ĉirkaŭaĵo, edukata ĉefe de la patro, post kiu li heredis kapablojn kaj inklinojn al matematiko.

En j. 1809 ni vidas lin ĉe la Jagelona Universitato kaj baldaŭ poste en korpuso de kadetoj kaj artileria lernejo en Warszawa, kaj fine en rajdartilerio de Warszawa'a Princlando. Ankoraŭ en la sama jaro li faras militiron kontraŭ Aŭstroj, kun kiuj li poste estos batalanta por libereco de Hungarujo.

Fininte studadon en rango de leŭtenanto li troviĝis en baterio de Ostrowski kaj kun ĝi alligita al korpuso de Macdonald partoprenis en milito de Napoleon kun Rusujo 1812 j. Same dum kontraŭrusuja ekspedicio, kiel precipe en Gdańsk (Danzig), kie lia baterio troviĝis kiel urbogarnizono en 1813, montris eminentajn kapablojn, ĝuis grandan amon ĉe militistaro kaj donis pruvojn de braveco kaj sinferemo. Do ne mirinde, ke li estis distingita per ordeno de Honora Legio. Post falo de Napoleon, kiam denove ekregis perforto de „trinigraj agloj“ kaj Warszawa'a Princlando fariĝis parto de „Kongresa Reĝlando“, post reorganizo de pola armeo (1815), Bem estis nomita

*) batalo por nacia liberigo.

kapitano de rajdartilerio kaj samtempe estis profesoro en artileria lernejo en Warszawa.

Tamen ne longe povis lia spirito por libereco kreita elteni en militistaro, komandate de brava tirano, Konstanty Pawłowicz. Post akra karcero pro manko de pruvoj oni liberigis lin, tamen li, kiel ne meritanta konfidon rilate politikajn aferojn, devis en 1827 forlasi armeon.

De tiam Józef Bem translokiĝas al aŭstria parto de iama Polujo; li loĝas en Lwów kaj Brody. De tiuj tempoj estas konata unu el liaj verkoj: „Pri vapormaŝinoj“.

Eksplodo de Novembra Insurekcio 1830 j. vekis lin denove al batala agado. Apud Ostrołęka li refoje pruvis siajn geniajn kapablojn artilerianajn. Li baldaŭ fariĝas kolonelo kaj ricevas krucon „Virtuti Militari“. Lia famo kreskadis kun ĉiu tago kaj al li estis turnitaj okuloj de Poloj dum falo de Warszawa. Bedaŭrinde generalo (tiam nomita) Bem ne povis jam savi, perditan de malkapablaj komandantoj, pozicion. Tamen li ne perdas kredon pri estonteco de Polujo. „...Polujo ne pereos, sed ni devas por Ĝi labori, fortojn ne ŝparante“.

Post la milito li foriĝis tuj al Germanujo kaj poste al Parizo, kie li povis libere spiri atmosferon de libereco. Tie li proksimiĝis al pariza polaro, tamen obstinaj kvereloj kaj malpacoj, kiuj ne priŝparis eĉ lian bônfamon, devigis Bem'n kaŝi sin al la pacejo de privata vivo. Li nun dediĉas sin al sciencaj studoj. De tiu tempo devenas verkoj: „Atlaso kronologia“, „Generala kurso de pola mnemonika metodo“ kaj „Polujo en siaj antaŭaj limoj kaj rusa imperio“. Lia lasta verko: „Pri la nacia insurekcio en Polujo“ esprimas lian kredon koncerne la polujan estontecon, tie Bem disvolvas planojn pri batalo por libereco.

„Printempo de popoloj“, tuteŭropa revolucio en 1848 vekis en li antaŭan fervoron tiel, ke dum marta insurekcio en Vieno li estis ĉeforganizanto de defendo ties ŝtato kontraŭ registara armeo. Post kapitulaco de Vieno li forkuris al Hungarujo, kie Kossuth donis al li ĉefkomandon en Sepkastellando. Generalo Bem, samkiel multaj Poloj, kiuj tien venis, kredis, ke reakiro de sendependeco de Hungarujo fariĝos la paŝo al liberigo de Polujo.

En Sepkastellando Bem montris pruvojn de eminenta energio, braveco kaj entreprenemo. Miraklojn de kuraĝeco li faris, malgraŭ manko de daŭra armeo, dank' al majstra priregado de militarto kaj organizado de militfortoj.

Grandeco de lia karaktero montriĝas en nobla konduto kun venkitoj, kio vekis por li ĝeneralan estimon.

Kampanio en Sepkastellando kaj Banato akiris por Bem senmortan nomon kaj amon de hungara nacio. Tial sinceraj estis esprimoj de ŝekleroj *) salutantaj venkintan komandanton ĉe sepkastellanda limo. Eljen Bem apó! Vivu paĉjo Bem.

Tiam skribis al li prezidanto de la Nacia Registaro Kossuth: „Mia patrujo rekonas viajn meritojn, Generalo, kaj ĝi ŝuldas al vi sinceran dankemon, kaj ĝi opinios kiel sian devon per ago tion pruvi. Via nomo fariĝos ne apartigebla de hungara historio, kun ĝi ligita ĝi ĉiam estos fiero de hungara kroniko“.

*) posteuloj de iamaj kolonistoj en Hungarujo.

La menciita ordeno kun diamanto de la hungara krono povas esti plej bona simbolo de hungara dankemo por Bem.

Tamen tie sur hungara tero estis ripetigonta sorto de la pola insurekcio en 1830. Same tie, kiel ĉe ni tro malfrue oni fordonis al Bem la ĉefkomandon.

Intertempe „nigraj agloj“ donis al si manojn por forpremi la hungaran insurekcion. Jam estis tro malfrue!

Bem rifuĝis Turkujon. Por ankoraŭ helpi Hungarojn li akceptis mahometan kredon kaj sub nomo de Murat Paŝa komencis labori pri reorganizo de turka armeo, tamen pro postulo de Aŭstrio kaj Rusujo estis internata en Aleppo 1850 j.

Li ekbrilis ankoraŭ foje kiel komandanto batalante venkplene kun Araboj, tamen baldaŭ li mortis pro febro.

Lia tuta vivo jen la batalo en nomo de signalo de libereco, kies kavaliro li estis. Liaj faroj estas pruvo de arda amo al patrujo, por kiu li pretis eĉ la religion ŝajne ŝanĝi. Gen Czetz skribas pri li: „...Li estis granda kiel soldato, sed ankaŭ kiel homo, ĉar nobla, homama, bonfarema eĉ rilate al la venkitoj. ...Lia persona kuraĝo trapasadis ĉiujn limojn... De lia modesta aspekto videbligadis io sublima kaj granda, ĉiu lia agado, ĉiu lia paŝo elmontradis genion“.

Lia revo estis lastripozadi sur Pola tero. Fine plenumiĝis liaj deziroj, ĉar jen liaj korpaj restaĵoj revenis Polujon. Li, Komandanto-heroo triumfe tra multaj teroj humidigitaj per sia propra sango kaj de siaj kunbatalantoj pri la libereco, revenas, por ripozi sur tiu tero, pri kies libereco li dum la tuta vivo batalis.

Kaj fadeno de amikeco inter ambaŭ nacioj, tiriĝanta tra jarcentoj, tra bonfartoj kaj misortoj fortikiĝis dank' al la heroa komandanto.

Je gardo de parenceco de kulturo kaj amikeco pol-hungara staras: „Paĉjo Bem“.

József Garbaciĉ, stud. de filoz.

EL LA GAZETARO.

Sinjoro Georges Avril en la n-ro 251 de sia *Jurnalo Eclairer du soir* eldonata en Nice, okaze de la Genevaj diskutoj pri la Pan-eŭropo citas vortojn de la eksprezidanto de ministra konsilantaro, s-ro Painlevé pri la graveco de la mondlingvo Esp. Li diris: „Se Esperanto povus fine iĝi la helplingvo pri kiu ni revas- ĝi tamen estos sendube, kiam ĉiuj prudentaj homoj konsentos uzadi ĝin sammaniere, kiel oni uzadis iam antaŭ du jarcentoj inter si kulturaj homoj lingvon latinan, — kiom da maluzita tempo estos ŝparota! Kiom ni estos kontentigitaj povante konstati, ke dank' al tiu ilo kreita de la bona volo kaj genia konscia penso de unu viro, ĉiuj horoj de la scienculo estos fruktedonaj sen malutila tradukado — por la bono de ĉiuj, kiuj deziras utiligi fruktojn de lia scienco. Esperanto estas ja kampo de homa agado ne nur por malgrandaj potagaj aferoj, sed ĝi servos donacante al la homaro unuarangajn servojn: alproksimiĝon de popoloj, neniigon de la internaciaj miskomprenoj, — ĉar la vojaĝoj kaj personaj interparoladoj penetrigos kaj komprenigos diversajn

regionojn de homa penso; se vi pripensos cetere la multobligon de tuĝa komerca agado; kiom granda blindulo oni devus esti, se oni ne povas tuj kompreni la valoron de la grandioza verko, ne nur por si mem, sed por sia patrujo kaj samtempe por tuta homaro.

La altŝatata redaktoro aldonas, ke estas neeble, ke s-ro Paul Painlevé povus ŝanĝi sian tiel bone bazitan kaj de li mem esprimitan opinion. Estas ĝusta momento prezenti al la Parlamento demandon de oficialigo de l' Esperanto, al kio eĉ s-ro Aristide Briand ne povas ne konsenti sekvante la ekzemplon jam donitan de Svedujo, Rumanujo, Aŭstrio kaj eble post ne longe de aliaj nacioj. Sufiĉas nur unu prudente farita eksperimento, kiu nepre dum nelonga tempo okazos. Kial do Francujo ĉiam iniciatema je noblaj agoj restas senmova? tio ne kostos multe, rezultoj tamen superos ĉion atenditan".

Nia Redakcio tute konsentas kun la supre cititaj argumentoj. La gajno kaj gloro apartenos al tiu, kiu unue komencos. Tuta homaro estos por ĉiam dankema al la iniciatantoj de tiu grandioza eksperimento.

Senutila estas ĉiu pensado pri la Paneŭropo, se oni devos traduki ĉion je kvar aŭ kvin aristokrataj lingvoj. Ĉiuj nacioj de la mondo havas rajton esti komprenataj kaj paroli en sia lingvo, aŭ en la lingvo, kies nacio ne deziras samtempe konscie aŭ ne konscie altrudi kun la lingvo ankaŭ la nacian kulturon. Por tiu celo povas servi nur vere neŭtrala lingvo sen iu ajn kulturo nacia.

Ni ĉiuj, reprezentantoj de malgrandaj nacioj, aŭ de nacioj, kiuj ne rajtas paroli dum la internaciaj kongresoj kaj konferencoj, ĉu sciencaj ĉu politikaj, havas de naturo al ni donitan rajton esprimi niajn sentojn tute sendepende. Al ni eŭropanoj jam post ne longe sendube asocios ĉiuj nacioj de la aliaj partoj de la mondo. Japanoj, Ĉinoj, Brazilanoj, Hindoj — la mondo estos devigita konstati, ke ni ĉiuj naciaj malplimultoj superos la nunan plimulton.

Ĉu ne estas la afero de la Ligo de Nacioj jam nun pripensi la aferon kaj reguli alproksimiĝantan torenton?

Homo vere kulturema ne povas esti malamiko de iu ajn nacio aŭ kulturo; li komprenas, ke kiel unuopaj homoj ankaŭ la nacioj havas ĝian apartan karakteron, ne ĉie al ĉiuj komprenebla. Sed estas la afero de persona kaj nacia ambicio esti ne negliginda aŭ negligata de aliaj nur pro tio, ke oni estas malplimultulo!

Al tiu temo ni ankoraŭ revenos.

O. B.

SUPERNACIISMO DE HEROLDO.

Komence de l' nuna jaro okazis, ke delegito de germana malplimulto en pola Silezio s-ro Ulitz estis suspektata, ke li plifaciligas al rekrutoj de pola armeo forkuradon eksterlanden. Tiam li, kiel politika krimulo estis arestata kaj malliberigata. Laŭŝajne — nenio stranga. Sed alie pensis germanoj loĝantaj en ĉiam pola, nur dum kelka tempo germana, Silezio, kiuj faris tion granda ŝovinistaĵo de pola registaro, kvankam ĝi estis nur malliberigo de krimulo, kio okazus same ankaŭ, se li ne estus germano, sed polo aŭ ĉino. La proceso, kiu estas jam finita, pravas sendube lian kulpon.

Sed ne longe poste okazis, ke pola opero en Katowice veturis al Opole, en nun germana Silezio *), kanti tie la polan operon „Hal-ka“. Kiu konas tiun ĉi operon scias, ke ĝi tute ne enhavas iajn ajn kontraŭgermanajn aŭ speciale naciecajn tendencojn. Komprenoble — skribita de polo — ĝi temas pri poloj **). Sed jen en Opole okazis io terura. Sur la elirantajn el la teatro geartistojn sin ĵetis aro da ŝovinistoj amasigitaj cirkaŭ la teatro... Germana policistaro ne nur ne defendis la polajn artistojn, sed ankoraŭ plifaciligis la atakadon, foriĝante de la loko. Oni batis virojn kaj virinojn sovaĝe, senkompate.

La pola nacia gazeto esperanta „Pola Esperantisto“ skribis pri la supre citita afero ne eĉ unu vorton, tiel pro delikateco, kiel ankaŭ por ne pliprofundigi internaciajn malkomprenaĵojn kaj diferencojn, dume la „internacia“, „sendependa“ kaj „universala“ Heroldo el Köln en la n-ro 13 (509) de 29 de marto k. j. presigis longan artikolon pri la naciaj malplimulto, kie iaj „mondobservantoj“ plendas kiel granda maljustaĵo okazis al germanoj ĝenerale, kaj al s-ro Ulitz speciale pro lia aresto. Kelkajn tagojn poste, aŭ samtempe, oni lasis s-ron Ulitz libere kontraŭ garantiaĵo, kaj unu monaton poste (28 IV 29) oni batis en Opole polajn kantistojn. Kaj tiam ien malaperis la defendantoj de justeco kaj de malplimulto... Heroldo silentis... Tiam mi skribis al ĝia redakcio artikolon, en kiu mi klarigis la aferon kaj petis pri la enpresado. En 24-a n-ro mi ricevis respondon, ke mi traktas la aferon tro unuflanke, ke oni ne enpresos la artikolon, sed mi ne devas malesperi, ĉar iam oni la temon ankoraŭ priparolos.

Intertempe mi tralegis en n-ro 23 (519) de H. en la artikolo: „La vojo de la astronomio“ de H. J. Plehn, ke pola scienculo Nikolao Kopernik estis nomata „Kopernigk“ kaj estis „orientgermana spirito“...

Mi tre ekmiris, ke redaktoro de Heroldo, homo sendube saĝa kaj plenscienca povis lasi tian mensogon, kaj pri tio ĉi mi denove skribis al li, aldonante kelkajn proprajn rimarkojn. Interalie mi estis skribinta, ke tiel „internacia“ gazeto kiel „Heroldo“ ne devas tuŝi temojn, kiuj estas tro incitemaj kaj ofendantaj nacian senton, kaj ke li plu ne lasu historiajn mensogojn aperi en la gazeto. Tiam respondis al mi s-ro Teo Jung tute private (poŝtkarte) jenon:

Trè ŝatata Samideano! Mi dankas pro via letero de 6. 7. Sed vi, ŝajne, forĝegas ke la ŝovinista (kaj parte eĉ la malpli ŝovinista) gazetaro de iu lando ĉiam troiĝas pri malbelaj aferoj okazintaj eksterlande sed kutimas laŭeble prisilenti malbelajn aferojn okazintajn en la propra lando. Tiel via gazetaro troiĝis la Oppeln-skandalon, kaj la germana gazetaro troiĝis la Ulitz-aferon kaj aliajn okazajojn en via lando. — Mi volas ankoraŭ menci, ke la unua artikolo, kiu aperis en Heroldo pri la minoritato en Polujo (Ulitz) kaj Ĉeĥoslovakio, estis verkita de germano kaj polo loĝantaj en (nun pola) Silezio. Ĉu Kopernik estis polo? Ŝajnas ke li estis pli homo (tuthomano) ol polo; ĉiuokaze li estis granda scienculo.
Samideane, via
Teo Jung.

Respondo — mi devas konfesi — iom naiva. En Polujo oni nomas ĝin „zĝlupia frant“. Mi ne bezonas tute la certigon de s-ro T. J., ke Kopernik estis granda scienculo. Pri tio scias ja la tuta mondo. Ĉu li estis pli homo ol polo — mi ne scias, mi scias nur, ke li (Kopernik)

*) La stilo konformigita al ĉi suba pkarto de Heroldo. **) Ĝi estis prezentata dum VIII. Int. Kongreso en Kraków en esp. traduko de Grabowski.

en siaj verkoj nomas la agadon de krucordenanoj (Kreuzritter, Krzyżacy), kiujn li mem kiel polo malamis pro iliaj kruelaĵoj, malhoma eĉ besta... Sed ne gravas. Mi volis nur montri, ke tiu „supernaciismo“ de Heroldo, pri kiu T. J. tiel bele skribas en n-ro 36 (532) havas tre malfortan bazon, kaj ke tiu germana nacieca spirito enpenetras tre profunde en ĝian enhavon kaj montras alte la elstarantan pugnon kun vortoj: „Deutschland über alles“...

Kaj kiel longe tio daŭros, Heroldo neniam plenumos bone kaj inde la rolon, kiun metis sur ĝiajn ŝultrojn tutmonda Esperantistaro t. e. respeguli vere la supernacian spiriton, senpartian kaj neŭtralan.

Kaj tio dependas nur de internacia honesteco, pac- kaj veramo kaj ...iom da bona volo flanke de la redakcio. **Józef Toczyński.**

La Redakcio ne tute konsentas kun la iomete akra formo de la artikolo, sed, bedaŭrinde, en la enhavo estas cititaj faktoj. Ni preferus ne esti devigitaj tuŝi similajn temojn.

P. S. Jus post la ricevo de tiu ĉi letero ni tralegis en pola gazeto Kurjer Ilustr. pri la decido de Berlina Ministerio de publ. edukado sciigon tre kontentigan, kiu devas esti menciita. Nome ĉe Podstolin (Okcidenta Prusujo) loka estraro fermis polan lernejon kontraŭ la volo de la loĝantaro. Dank' al la penadoj de parlamenta deputito Baczewski la Ministerio en Berlin ree malfermigis la lernejon, plenumante la deziron de la loĝantaro.

Tiujn pruvojn de justeco ni ĉiam tre alte ŝatas kaj laŭdas. **Red.**

BIRDO EN KAĜO!

„Ho filo de Spirito! La kaĝon rompu, kaj kiel fenikso de Amo ŝvebu en la Ĉielon de sankteco! — Baha' u' llah“).

En drata kaĝo saltetas birdo, filo de aromaj arbaroj. De unu stanĝeto sur alian, de l' akvujo al sukerpeceto, metita inter la dratojn, ĉirpante saltas la birdo.

Ĝi naskiĝis en kaĝo. Verdecon de arbaro ĝi neniam vidis, neniam aŭdis murmuradon de torento aŭ kanton de ventblovo, movanta foliojn de arboj.

Kiel atingas ĝia memoro, ĝi ĉiam vidadis ĉirkaŭ si la dratajn murojn kaj trans ili, en granda ĉambro homajn figurojn, siajn prizorgantojn kaj nutrantojn.

Per la lertaj, delikataj piedetoj ĝi saltas de stanĝeto sur stanĝeton, de sukero al akvujo. Ĝi havas flugilojn — vere. Kelkfoje, kiam ia nekomprenebla prainstinkto ekkantas en la eta koro strangan melodion, la birdo disetendas la flugilojn, disstreĉas la plumetojn. Ĝi ŝajne volas flugi ien, malproksimen. Sed la dratoj baras la vojon — la birdo ne forflugos. Cetere ĝi ne deziras eĉ forflugi — en la kaĝo estas tiel bone, tiel trankvile.

*) Baha' u' llah — fondinto de nova religia movado, kiu, komenciĝinte en la mezo de la lasta jarcento en Persujo, disvastiĝas nun tra la tuta mondo. Unu el la ĉefprincipoj de tiu ĉi religio estas unueco de la homaro: „Vi ĉiuj estas folioj de unu arbo, floroj de unu ĝardeno, gutoj de unu maro“.

Tamen unu tagon oni elpelis la birdon el la kaĝo. Ho, ĝi ne volis eliri! Freneza pro timo ĝi kroĉadis sin jen al stangeto, jen al drato, sed iaj manoj penetris en la kaĝon kaj ekĉasis la birdon — por ke ĝi elflugu, por ke ĝi ekzercu siajn malfortajn flugiletojn. Ia voĉo parolis karese, invitante, sed al la eta kantisto tiu ĉi voĉo ŝajnis kiel bruoj de tondroj kaj delikataj infanaj manoj — teruraj fantomoj-timigiloj.

Kaj kiam la manoj ĉasis ĉiam pli insiste, kiam la kaĝo montriĝis senrifuĝa, ebria pro timo, nenion vidanta, nenion aŭdanta, la birdo blinde ĵetis sin flanken kaj hazarde trafinte la elirejon, elflugis el la kaĝo.

Lacega, tremanta, dolore spireganta ĝi rifuĝas en plej malluman angulon de la ĉambro, sed ne estis al li donita ripozo. Denove oni sekvas, denove oni ĉasas ĝin. Kaj jen la kompatinda eta estaĵo, birdo, naskita en kaĝo, ree streĉas ĉiujn fortojn kaj per la delikataj, tiel mallertaj flugiletoj levas sin supren, tien, kie lin homaj manoj ne atingos.

De tiu ĉi tempo tiuj ekzercoj ripetadis sin ĉiutage. Komence ili estis por la birdo torturoj kaj turmentoj. Sed post iom da tagoj la malfortaj, mallertaj flugiletoj komencis fortiĝadi kaj lertiĝadi. La minaco de l' ĉasantaj manoj ne estis plu tiel timiga, ĉar kelkaj movoj de la flugiloj portis la birdon ekster ilian atingeblon.

Kaj iom post iom la birdo komencis eĉ trovi plezuron en tiuj ekskursoj ekster la kaĝon. Ĝi malpacienis, kiam oni ne malfermadis la kaĝon ĝustatempe, kaj eĉ sukero ne povis ĝin tiam trankviligi.

La granda ĉambro fariĝis ia dua domo. Ĝi flugadis nun de objekto al objekto, de meblo al meblo, konatiĝis kun ĉio, kio estis en la ĉambro.

Kun ĉio? Ho ne! estis ja io mistera, stranga, io, kion ĝi neniel povis kompreni. Ĝi estis la fenestrovitro, baro malvarma kaj nevidebla, kaj tamen malmola kaj nepenetrebla. Vane la birdo atakis ĝin per sia beketo, batis per la flugiloj. La baro restis nevenkebla.

Pasadis tagoj, pasadis semajnoj. La birdeto fariĝis tute forta. Kaj iaj signoj, unue nekompreneblaj, komencis anoncadi al ĝi gravajn ŝanĝojn. La tagoj fariĝadis ĉiam pli longaj, pli lumaj. En la aero vibris ia freŝeco. Eĉ tie, en la ĉambro oni sentis la alvenon de princo-printempo. Kaj sur branĉoj de seka arbo ekster la fenestro ekverdis folioj. Roso ilin lavis, venteto karesis kaj ili kantis al la loĝanto de l' kaĝo ĉarman kanton, kanton de printempo.

La birdo fariĝis maltrankvila. Ĝi, kiun oni devis iam perforte peli el la kaĝo, ĝi nun eksentis, ke la vasta ĉambro estas por ĝi tro malvasta, ke ĝi estas naskita ne por stangoj de drata domaĉo, sed por aromaj arbaroj, ke ĉiela roso estas nutraĵo pli dolĉa, ol sukero en kaĝo.

Ĝi fermis la nigrajn okuletojn kaj eligis el la gorĝo trilon, longan trilon, en kiu ĝi kantis la tutan mizeron de sia mallibereco, sian tutan sopiron. Kaj kiam la forto de ĝia voĉo elĉerpiĝis, kiam ĝi malĝoje mallevis la kapeton, okazis io, kio tremigis la birdon: la trilo daŭris!

Trans la fenestro, sur la verda branĉeto sidis alia birdo, birdo el malproksima arbaro, kaj per voĉo freŝa kaj pura kontinuigis la melodion de printempo, la melodion, kiun ĉiuj birdoj kantas de la komenco de l' mondo.

Kaj kiam la birdo el kaĝo ĵetis sin al la fenestro, por respondi al la saluto el transe, ĝi rimarkis subite, ke la fenestro ne estis precize fermita. Inter la kadroj estis spaco, spaco tre malgranda, sed sufiĉa...

...Ĉirkaŭblovis ĝin freŝa, printempa vento. La ĉarma branĉo ekremetis sub la tuŝo de ĝiaj facilaj piedetoj. De la najbaraj branĉetoj bonvenigis ĝin sonoj de aliaj birdoj kaj kune kun ili la liberiĝinto ekflugis kuraĝe supren, al la suno.

Lidja Zamenhof.

TERURA KVARONHORETO SUR LA OKCIDENTO — (NENIO NOVA).

(persona travivaĵo)



alamikaj kanonoj tondregas. Aeroplanoj ĵetas hajlegon da gasbomboj. Aero krevas per miloj da granatoj, kanonŝarĝoj kaj aliaj teruraĵoj de la milito. Triope ni ŝvitlaboras ĉe la kanonego, forsendante rapidvagonare malamikojn en la Postmondon. Deksesjarulo, mi estas jam spertulo. La dujara laboro sur la okcidenta fronto malimpresemigis min kontraŭ ĉiuj teruroj de la milito. Miaj du kolegoj, preskaŭ infanoj, morttremas ĉe ĉiu ekpafo...

Subite — infera ektondro! La tero malfermiĝas kaj mi eksentas min en ĝia interno, en profunda kavo. Nokto. Aero sufokiga. Buŝo plena da tero kaj ŝtonoj. Spiro-apenaŭa... Ĉu jam la morto?... Ne... ankoraŭ... Malrapide mi liberiĝas de la surpremanta tero, elŝprucas koton kaj ŝtonojn. En timego mi atendas. Ĉu mi tuj estos sen kapo, aŭ sen trunko? Eble sen ili ambaŭ? Super mi — kurado, ĉevalkuro, krioj — infero!... La infero palpas la vojon al mia rifuĝejo.

Mi estas sola. Miaj kameradoj ien iel malaperis. Ĉu ilin sufokis la tero, aŭ kvaronigis la malamiko?... Mi aŭdas voĉojn kaj malbenojn en nekonata lingvo... Malamikoj.

— Tien ili kakuloj *) rifuĝis!...

Mia koro distingiĝas vokon de l' morto. Okuloj streĉiĝas...

Io terura alproksimiĝas al mi!... Ĉu monstro sovaĝa?...

Fino de mia vivo... Mi neniam vidis tian bestaĉon...

Ĝi alŝteliĝas ĉiam pli proksimen... Mi nerve kaptas mian revolveron... Kiaj okuloj!... Kiaj dentaĉoj!... La besto paŝas singardeme. Ne!... homo!... du homoj!!... Pafiloj en la manoj, ponardoj inter la dentoj!... Mi celas... ili celas... Subite: — Haltu! Mi haltas, ili haltas.

Ĉu ili preferas tranĉi min kiel rostajon?...

Mi svenas.

Kiam mi rekonsciiĝis, ili, kliniĝante super mi, enverŝadis en mian gorĝon iun fluidaĵon.

— Veneno!!...

Mi protestas energie.

— Ne timu, trinku! diris en Esperanto la malamikoj.

*) Sro Remarque pardonu, ke mi emitas liajn esprimojn.

— ?!?... ĉu mi jam estas en la Postmondo?...

— He... he... ne, vi estas ankoraŭ sur nia bela mondo, kara samideano. Malrapide ni komencas rekonadi la belan mondon... Pensoj reordiĝas, la memoro revenas.

Mi vekigis. Mia kapo enhavas kvazaŭ iun dekkilogramon.

Mi kuŝas sur la kanapo sur la „En okcidento nenio nova“, (Remarque). Mia verda steleto triumfe brilas en la vestotruo. Ho, bela sonĝo de l' homaro! kiam vi efektiviĝos?...

P. S. Sinjoro Remarque asertas, ke en la okcidento-nenio nova... Hm... Dume la brulrestaĵoj de la lasta milito ne plenestingiĝis. Ili murmuris minace. Do, esperantistoj, rapidu samideanigi la idaron de la forbuĉitaj patriotoj.

Dum diversaj kongresoj (pacifistaj, socialistaj k. t. p.) sentiĝas ofte, ke ne ĉiam sufiĉas belaj vortoj kie necesa estas — la ago. Dum niaj universalaj kongresoj, precipe dum la budapesta XXI, kiu longe restos agrabla rememoro, sentiĝis en paroladoj de esperantistoj kaj de registaraj reprezentantoj — forta fido je nia apostola destino. Oni aŭdis, ke esperantistoj estos la avangardo de l' finfina venkiro al la eterna beno.

Oni fidas, oni esperas. Ni ne forgesu tion! Nobleco devigas. Kaj kiam venos la ora tempo de l' efektiviĝo de la bela sonĝo, la feliĉa homaro diros al la verdstelana avangardo:

— Vi ne trompis niajn esperojn.

Fez.

INTERPAROLO.

J. TUWIM.

Se en ĝardenon venos Di' dum nigra horo,

Kia ĝardeno?

— Sanktega...

Se ekzistas floranta noktmeze la floro,

Kia ĉi-floro?

— Mistera...

Se pri maro muĝanta stelo sonĝis vere,

Kiaj la sonĝoj?

— Mallaŭtaj...

Se post Vi, mia kara, mi ploris sincere,

Kiaj ĉi-larmoj?

— Malgajaj...

Malproksim' en abismon la amon sendanta,

La malproksimo?

— Terura...

Sopir' al Vi — kvieta, sankta, radiantanta,

Kia sopiro?

— Ho! Kristo!!!...

Tradukis **Eugenjusz Rytenberg.**

MI VIDIS ŜIN...

En sune hela tago, sidante apud la tablo kaj rigardante tra la malfermita fenestro de nia ĉambro la lazuran ĉielon, mi transportis min en pensoj al tiu dolĉa momento de mia enua vivo, kiam mi la unuan fajon vidis ĉarman, malgrandan ĉirkaŭ dekkvarjaran knabineton en ĝardeno, starantan kun manoj kruce metitaj sur la brusto kaj kun okuloj turnitaj al la ĉiellazuro.

Neniam plu mi forgesos la sopiran rigardon de ŝiaj okuloj bluaj, kiel la plej bela cejano kaj ondajn harojn, kun kiuj venteto ludis.

Kaj vere ravata mi estis vidante ŝin starantan sub branĉoj de pomujo kun manoj krucigitaj, rigardantan al la ĉielo, simila en tiu ĉi pozo al „enkorpigo de la kredo“, kiun mi iam vidis sur ia pentraĵo de nekonata pentristo.

Pasis multe da tempo de tiu ĉi kortuŝa momento, kiun mi konservus por ĉiam en mia memoro.

Kaj por ĉiam restos en mi la bildo de la malgranda ĉarma knabineto kun cejanobluj okuloj.

En grizeco de mia vivo tiu ĉi rememoro alportas krom nedirebla kortuŝo iom da ĝojo kaj ĝajeco, por kio mi devas esti al ŝi dankema.

Ve, mi ne kuraĝis diri al ŝi eĉ unu vorton pri tio, ke ŝi tiel forte frapis mian imagon, eble tial, ke mi sentis min kvazaŭ alforĝita al la tero, vidante ŝin enprofundiĝintan en siaj revoj pri io nekonata kaj eble nekaptebla, neatingebla.

Pri kio revis bela malgranda knabineto de kies vizaĝo mi ne povis deturni miajn okulojn?

Mi divenas tion.

Siaj pensoj fluadis supren, super la teron, al anĝelaro en la ĉiela sfero laŭdanta Ĉiopovulon, kien elŝiradis sin ŝia animo senkulpa kaj ĉasta.

Belega ŝi estis en sia meditado, ensorcita por mi ŝi restos en mia memoro.

Jen miaj pensoj estas okupitaj pri ŝi, dum la okuloj celas la rigardon en la horizonton vidatan tra la malfermita fenestro.

Sur la ĉielo per oro kovrita mi vidas la sunon ruĝan kiel purpura floro, kiu malrapidege subiras. Brilo de ĝiaj lastaj radioj estas baldaŭ estingiĝonta. La krepusko jam kovras funebre la teron kaj en mian ĉambrom trapenetas mallumo. Ho kiel malĝoje, kaj kun kia domaĝo mi rigardas la foriĝantan stelon tagan ĉirkaŭatan per palaruĝaj kaj nigrablujaj nuboj.

Sub influo de sorĉo de la belegeco de majesta vido ondiĝantaj en mi sentoj de kortuŝo ekregas tute mian animon kaj ankoraŭ pli profundigas profundajn jam pensojn pri nudeco de l' vivo kaj kaduka ĝia feliĉo.

La suno malleviĝis sed ankoraŭ longe, longe mi sidis ĉe la tablo apud la fenestro enpenso, enprofundigita en meditado pri mia enua vivo kaj revanta pri nekonata, malgranda, ĉarma knabineto.

W. Rymkiewicz.

Sonas serpoj,^{*)} lumas suno...

Al niaj kamparanoj.

La suno verŝas sur teron ardan fajron. Tremas la varmigita aero. Facilanima venteto susuras inter plenaj kaj maturaj spikoj de greno...

Ankoraŭ kelkaj tagoj kaj la grajno elŝutiĝus. La plej lasta tempo por rikolton komenci.

Falĉiloj kaj serpoj atendas. Iras el vilaĝo falĉistoj sur kampon. Junaj kaj maljunaj, patroj, filoj kaj nepoj. Staras ĉe orita greno kaj tranĉi komencas.

Takte, paŝon post paŝo ili eniĝas densan, fruktan sekalon. Sekalon kreske egalan al kampulo...

Kaj la suno brilas, rostas, bruligas senkompate...

Haltas ili momente. Ŝviton forviŝas de l' frunto. Kaj pluen ekbatas per serpoj, falĉiloj... Sufokan varmegon ne plendas... Digraco por ili ja estas serena vetero, ke suno klarlumas kaj garbojn sekigos...

Kaj kiam ĉiele montriĝas nubeto, kortuŝe rigardas falĉistoj kaj zorgo pentriĝas sur frunto. Ĉu pluvo ne falos aŭ estos malbela vetero...

Sed blankaj nuboj fornaĝis. Malaperis. Beltempo rikolta! Reviga!

Ĉie muzikas falĉiloj kaj serpoj...

Kie tero pli bona — pli frue...

Kaj ĝoje aŭdiĝas kantetoj:

Janjo, mia Janjo,

Rapide laboru.

Estos edziĝfestoj,

Kiam gren' — en kesto...

Sed ĉar virin' ĉe l' danco aŭ falĉo estas spitema, trilas knabinetaj voĉoj:

Jaĉjo, mia Jaĉjo,

Devos multe peti.

Pli facile serpi,

Ol la amon ĉerpi.

Dume mankas tempo por pripensi. Laboro ne atendas.

En pena laboro forfluas la tago. La suno direktas sian ĉaron okcidenten, per purpura brilo priverŝante la oritajn hubojn.

Tempo por ripozi. Malrapide krepuskas. La kampo dezertiĝas. En la fenestroj de kabanoj ekbrŝis palaj lumetoj. El la kamentuboj supreniĝas kolonoj da blanketaj fumo.

Svarmas en ĝardenetoj kaj kortoj. Tio, kion diradis surkampe la vortoj de l' kanto, diras nun buŝo al buŝo... Nur mallaŭte, murmure, sed tamen varmege, ame...

Janjo ne plu diras „ne“. Eble nenion diras, sed kor' ŝia per tuta sia voĉo vokas: jes!

^{*)} serpo — rikoltilo; urba duonronda tranĉilo kun dentoj aŭ sen ili.

Malrapide noktas... Steloplana, trankvila, silenta ekestos la nokto...

En la fenestroj de l' kabanoj estingiĝas lumetoj unu post la alia, kaj sur la ĉielo eklumiĝas stelo post stelo...

Ĉiam pli trankvile, pli silente, sonĝe kaj dorme...

Nur ie hundo ekbojas, kaj alia respondas. La nokto ĉirkaŭbrakas la mondon. Peza dormo fermas palpebrojn.

* * *

La somera nokto estas mallonga. Apenaŭ homo iom tradormis kaj jam mateniĝas.

La ruĝa suno signas la tempon de l' leviĝo.

Denove ektintos falĉiloj kaj serpoj...

Parizo, en aŭgusto.

Grenkamp-Kornfeld.

„ĴURNALO DE ANTAŬ 200.000 JAROJ“

Se oni ĝis nun ne trovis ekzemplerojn de tiu-ĉi gazeto de antaŭ 200.000 jaroj, tio ne estas la pruvo, ke ili ne ekzistis. Simpladire pro konfiskordono ĉiuj jarkolektoj estis detruitaj.

Jen kelkaj informoj, kiujn mi sukcesis rekonstrui sur la bazo de l' tradicio.

Stelo. Iu Loo forŝtelis viandon de ŝakalo. La reganto kondamnis la kaptiton je fortranĉo de l' ambaŭ brakoj. Tamen pro amnestio oni pardonis al li la duonon de l' puno.

Sensacia invento. Niaj teknikistoj elprovis la inventon, aŭgurantan grandajn esperojn. Ĝi nomiĝas „Ronda piedo“. La invento apogas sin sur tio, ke sub multepezan objekton oni submetas rondan bastonon kaj tiamaniere oni povas tiun-ĉi objekton tute facile puŝi. Kion ankoraŭ atingos tiu-ĉi freneza disvolviĝado de l' teknika kulturo!

Progresoj en medicino. Vastaj rondoj de l' publiko preparolas la lastan operacion de nia sorĉisto Mii: li fortranĉis sendolore kruron al la ĉasisto Buu, vundita de rampaĵo. Jen antaŭ la operacio li frapis la delikventon tiel forte je la kapo, ke tiu-ĉi perdis konscion dum la tuta daŭro de l' operacio. Do la medicino ĉiam pli klopodas malgrandigi la ŝuferojn de l' homaro.

Plej novaj kreitaĵoj de tualetoj. La viroj, kiuj volas fari agrablajn al siaj edzinoj, aĉetas por ili tabuleton, preparitan el ostoj kaj provizitan per dekelko da dentoj. Por tiu-ĉi tabuleto jam akceptiĝis la nomo „kombilo“, tamen ne tute ĝuste, ĉar ĝi devus nomiĝi „gratilo“ tial, ke ĝi estas uzata por la gratado de l' kapo. Elegantaj sinjorinoj jam ne gratas sin per ungoj, sed per tiu-ĉi nova ilo.

La lasta kunsido de l' Akademio. Dum la lasta kunsido de l' Akademio nia saĝulo Duu raportis sian lastan teorion, koncerne al la pozicio de nia tero. Li pruvis, al ĉies kontento, per frapantaj argumentoj, ke la tero kuŝas sur testudo, kaj tute ne sur fiŝo, kiel oni ĝis nun opiniis. La malnovan tezon defendis furioze nur lia kolego Mee, tamen sen pli profunda konvinko. La revolucia teorio de prof. Duu, laŭ nia ĝenerala opinio, ŝanĝos tute nian mondkoncepton kaj permesos al ni pli facile ekkoni la esencon de l' universo.

Nekrologo. Ni priploras la morton de l' respektinda vidvino s-ino Pii. Ni formanĝos ŝin laŭ plena ceremonio.

Suno sur la tero. En la ŝtato Olala oni faris tre interesan eksperimenton: jen interfrotante du sekajn branĉojn oni atingis, ke la suno venis teren, varmigis kaj bruligis. Nia sorĉisto asertas, ke pro tiu-ĉi krimo atendos la loĝantojn granda puno. Ili dume praktike eluzis tiun-ĉi inventon: ili bruligas la viandon de bestoj kaj manĝas ĝin tia. Ĝi estas la klara pruvo de fordegeneriĝo de tiu-ĉi raso. Generale oni devus proklami la militon kontraŭ ili.

Demoralizo. La vidvino de s-o Krr, anstataŭ porti ĉe si la kranion de l' edzo dum ok semajnoj, faris tion nur dum kvar, poste ŝi edziniĝis. Tiu-ĉi senhonta ago renkontiĝis kun ĝenerala indigno. Nun mankas nur, ke niaj vidvinoj tute ne portu ĉe si la kapojn de l' mortintoj.

Ekspozicio de bildoj. Du artistoj s-oj Sii kaj Gzi ekspoziciis siajn plej novajn desegnaĵojn, elgratitajn sur roko, kiuj prezentas bestojn. La verkoj ĝenerale plaĉis kaj la reganto deziris premii la artistojn, kio tamen estis neebla, ĉar ili batis sin reciproke ĝis senkonscio, nomante unu la alian fuŝulo.

Familiaj informoj. La edzino de nia reganto naskis la kvinan filinon pro kio la reganto rompis al ŝi du ripojn. La stato de l' patrino estas kontentiga.

Fino. En la lasta numero ni sciigis, ke la reganto rompis al sia edzino du ripojn. Ĝi estis nepreciza, ĉar li rompis nur unu ripojn kaj brustoston. Tial la reganto suspendis la ĉefredakton, kaj la tutan eldonon li ordonis detrui. La sekvanta numero aperos post du mil jarcentoj.

Transskribis: **Tommy**
el la pola verdlingvigis: **T. Hodakowski.**

DUONTAGON AL DÖMSÖD.

Dediĉe al Samideanino E. Ŝ.

La flankaj ekskursoj: jen karakteriza trajto, la ĉefa oni povus diri, de nia XXI-a. Oni ekskursis al Visegrad, al Dömsöd, al Pecs, al la Balaton-lago; ĉiam entuziasme, ĉiam sub la ĉarminfluo de la ĉi-jara ĉielo de Esperantujo.

La 6-an de Aŭgusto — intermikse pluvega kaj brulsuna tago — je la 3 posttagmeze, trideko da ekskursemaj gesamideanoj kolektiĝas sub la arkajo de la Redutpalaco. D-ro Gyula Lukacs, febre nelacigebla organizanto, kaj ĉiu siaparte, senpacience esploras ĉu la veteron, ĉu sian propran dubemon, ĉu... sed S-ro Merchant, nia simpatia Prezidanto, personigo de l' angla gentlemaneco kaj de la esperantista samideano, diplomatie fortranĉas ĉiun dubon — feliĉe! — kaj ĉiuj enaŭtobusiĝas.

Post kelkaj minutoj ni trarulas rubandŝajnan straton meze de la hungara „kukorica“ kamparo, preterpasas karakterizajn, bel-kaj puraspektajn vilaĝojn, longajn vicojn da ĉevaltirataj ĉaroj, kies kondukistoj volonte grumblosakrus al ni, arojn da vagantaj anseroj, kiuj bruege dividiĝas diskure sub la premo de nia rapida alveno.

Unu horo kaj duono forflugas en plej harmonia babilado internacia — dek nacioj estas reprezentataj — kaj, fine, jen ni alvenas al Dömsöd, sur la bordo de trankvila Danubobranĉo.

Mirinde! La tuta loĝantaro atendas nin por inde nin akcepti! Ho! la delikatpensa preparo de la sola tiea esperantisto kaj mem vilaĝano!!

Ni eniras en la Petöfi-fürdő (banejo) kie gastame nin atendas la afabla posedanto, la vilaĝestro, la loka eminentularo. Interŝanĝo de naci-internacilingvaj salutoj, vere frata interkonatiĝo kaj kuntaktiĝo en la varmeta atmosfero de homproksimigaj sentoj. Ni vizitas, poste, la ampleksan gastejon, sur kies fundo fiere reliefigas bela busto de la hungara liberecama bardo Aleksandro Petöfi. Honore al li la esperantistoj venis por alfiksi sur ĝia bazo memorigan plaketon.

Sur estrado, ĉe la kontraŭa flanko, cigana orkestro ekludas la naci-internaciajn himnojn, oni voĉakompanas — pro lingva neeblo pli-malpli ĥore — ilin.

Ĉarma, pursanga hungarino, portanta nacikostumon, deklamas por la esperantistoj Zamenhofan versaĵon, kaj poste, oni invitas nin viziti la tutan banejon. Trankvila, paradiza loko, kie niaj iom lacaj nervoj tiom volonte refortiĝus per pli longa restado!

Oni rapide fotografas ĉar baldaŭ mallumiĝos. Grupoj de gehungaroj en siaj blank- kaj vivkoloraj kostumoj intermiksiĝas kun la samideanaro, ĉiuj grupiĝas en ordo antaŭ la urgantaj fotoaparatoj. Ĉarme delikatan japanan samideaninon oni invitas mezen de du fortikaj, junaj hungaroj... trak... Farite!... Dankon!... Ni vidos nin mem poste, ĉu ne?

Intertempe ni proksimiĝas al la ekstrema riverbordo. Kelkaj samideanoj eĉ enakviĝas kaj ĝuas naĝadon. Bela vesperkrepusko ĉe Danubo.

Delikatsenta poezio enpenetras nian animon, la variaj duonkoloraj, paliĝantaj, nuancoj de tiom por ni eksterordinara, malofta sunsubiro, elkaptas nian intiman fibraron, respeguliĝas en ĝi, ĝin superregas. Ĉiu romantikema temperamentulo sendube spirite apartiĝas, kvazaŭ izoliĝas meze de la gaja ĉeestantaro por ĝui, en plensilento, la poezifluon de tiu forpasanta horo!

En la gastejo la invititoj rekolektiĝas, altabliĝas, interbabiladas. La ciganorkestro ekludas hungarajn dancmotivojn; la junaj paroj ekĉardaŝas, ĉardaŝadas senlace. Anĝelokula, blonda svedino en alloga nacia kostumo montras sian ĵus akiritan ĉardaŝarton. Bavaro, seninterrompe junaĝe, gaja, prezentas fajre jonglan dancon de sia regiono, kantisto-virtuozo, admirinde agrabligas nin per siaj vibroplenaj kantoj ĝis kiam, laŭ peto de niaj gastigantoj, ni regrupiĝas meze de ili kaj denove kantas la himnon. Apude, bruna, tiea belulino ekprovas duonvoĉe la arion. Ĉarma kaptindaĵo! Kiel autografĉasisto mi havigos al mi cian nomadreson por sendi al ci la notojn de De Menil! Tiel farite la morgaŭan tagon. Kaj nun ci lernu kaj lernigu de ĉiaj amikinoj la arion de la „nova sento“! Se plaĉos al Dio ni revenos vin aplaŭdi!

Unu horon antaŭ noktomezo ni realvenis al Budapeŝt. Tamen la programo de la festo konsentis, kvazaŭ promese, restadon por ĝismatena dancado. Tro multe por ni esperanto-laboristoj! Sed kiu povus, en normala semajno, malakcepti tian bonkoran abundon! Ĝis revido. Kiam?

KIAL VI ESTAS JAM FOR...!

Krepuskiĝas.

Mi sidas en angulo de kanapo kaj enprofundiĝas en pensojn. Pri kio mi pensas? Kien kuras miaj pensoj, miaj revoj?

Mi estas jam en Warszawa, sed anime — tre, tre malproksime.

Mi estas tie, kie fluas blua Danubo, kie leviĝas kontraŭ la nuboj Gerhard-monto, mi estas en la urbo, kiun benas Sankta Gerharo.

Mi promenas sur bordo de la rivero, mi apogas min je balustrado kaj jen vidas potencan reĝan palacon, jen fiŝkaptistan bastionon, jen malnovan fortikaĵon.

Silente mi staras sur la bordo de Danubo, kiu rakontas al mi historion de Hungarujo, historion de brava popolo komence de Arpad-tempoj.

Malrapide mi supreniras fiŝkaptistan bastionon, kaj mi rigardas de supro la kontraŭan bordon, kie regas majeste grandioza parlamento. Sur malbela fono de l' firmamento ĝia silueto aspektas potence. Ĝi ŝajnas etendi brakojn al ĉielo kaj postuli la justecon.

Mi iras sur ponton.

Antaŭ miaj okuloj neesprimebla aspekto: miloj da lampoj sur stratoj, pontoj, montoj kaj sur montpintoj, luminitaj sorĉe citadelo, monumento de Sankta Gerharo kaj bastiono de fiŝkaptistoj.

Fabelo aŭ realaĵo?

Jes realaĵo — tio estas ja en Budapeŝto, reĝino de Danubo.

Mi iras antaŭen kaj atingas Margaret-insulon.

Belaj, bonodoraj rozoj, altaj, fieraj poploj invitas pasanton eniri.

Mi preterpasas lumitajn aleojn, elegantajn restoraciojn kaj mi serĉas trankvilan lokon.

Jen ĝi estas malproksime de homoj kaj de bruo de granda urbo.

Mi sidiĝas sur benkon. Antaŭ mi fontano.

La akvo fluas mallaŭte sur ŝtonoj.

Kion ĝi rakontas senĉese, senĉese?

Belan fabelon ĝi flustras.

Pri kio?

Pri tio, kio estas, kaj pri tio, kio estos.

Ĉu vi diras la veron? Respondu al mi, ho fontano!

Respondas silento kaj trankvila murmuro de akvo.

Ĉirkaŭe melankolia zumo de griloj.

De l' malproksimo aŭdiĝas ciganmuziko.

Ho, belaj, budapeŝtaj vesperoj, kial vi estas jam for!

Warszawa, en aŭgusto 1929.

Halina Weinsteinówna.

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ GRAVA PETO.

Radjostacio en Wilno petas, ke radjoaŭskultantoj sendu deziron kiun lingvon ili volas lerni. Pro tio ni petas ĉiujn Esperantistojn kaj iliajn konatulojn sendi dezirojn pri enkonduko de Esper.-kurso.

CIU SAMIDEANO PLENUMU SIAN DEVON NEPRE KAJ SENPROKRASTE!!!

LA ODORO DE L'MORTO.

Ne multe da personoj posedas la kapablon antaŭsenti kaj antaŭvidi okazajojn, kiuj okazos ne pli frue ol en estonteco. Ĉi tiun kapablon oni nomas ordinare „klarvido“. Se la antaŭsento fariĝas helpe de flarorgano, la nazo, tiam oni devas uzi logike la terminon, iom strange sonantan, nome „klarflaro“.

Ĉi tian kapablecon „klarflaron“ posedas, laŭ raportoj de iu germana gazeto, juna inteligenta virino s-ino F. Ŝi estas cetere komplete „normala“ kaj ne diferencas de aliaj junaj edzinoj: ŝi iradas en kinoteatron, pasie kartludas kaj amas dancadon.

Ŝia denaska ĝoja anima stato cedas tamen iafoje al subita ŝanĝo kaj post bonhumoro sekvas momentoj de malĝojo kaj deprimateco. Ĉi tio okazas tiam, kiam en ŝia ĉirkaŭo, aŭ en pli proksima ĉu malproksima najbareco, al iu persono minacas baldaŭa kaj neatendata morto. En ĉi tiuj okazoj alblovas ŝin ia karakteriza naŭze-dolĉaodoro.

Ĉi tiu stranga fenomeno montris sin ĉe ŝi unuafoje ĉe la morto de ŝia avino, kiam ŝi estis ankoraŭ juna 12-jara knabino. Kelke da jaroj poste la okazajo ripetiĝis mallonge antaŭ la morto de ŝia patrino. En pli malfrua vivo „la pernaza morto-antaŭsento“ ripetiĝis ĉe ŝi tre ofte.

Unu fojon s-ino F. vizitis en hospitalo sian antaŭan serviston malsanan je tifo. La farto de l'paciento estis laŭ opinioj de kuracistoj jam tiel bona, ke li povus forlasi la hospitalon post kelkaj tagoj kaj reveni hejmen. Sinjorino F. tamen ne partoprenis la optimismon de la kuracistoj kaj rekte deklaris, ke maljuna Johano mortos baldaŭ. Kaj efektive post kelkaj jam horoj ĉe la malsanulo okazis tute neantaŭvideblaj komplikoj, kiuj kaŭzis subitan morton.

Unu el la kolegoj de ŝia edzo intencis post sia malsano ekiri al la sanigejo, kuŝanta en la ĉirkaŭaĵo de Vieno, por fini la kuracadon. Dum sia antaŭvizito alblovis s-inon F. karakterizaodoro de l'morto kaj post paso de unu plentago la resaniĝanto kuŝis jam senviva.

La plej kurioza okazo estis notinda, kiam la „aŭguristino de l'morto“, ĉeestanta gajan kinoteatron spektaklon, subite per sia flaro antaŭsentis ian mortan okazajon. Post eliro de la teatro ŝi ekvidis sur la strato kunkurintan homamason, kiu ĉirkaŭis kuŝantan sur la trotuaro viron, mortintan antaŭ nelonge je koratako.

Ĉiuj citataj okazintaĵoj kaj multe da aliaj similaj, priparolantaj la fakton de la „pernaza morto-antaŭsento“ estis certigitaj de seriozaj kaj kredintaj atestantoj. Trad.: Prof. Sygnarski.

TRADUKA KONKURSO.

La premion ĉifoje meritis „Agar“ (S-ino Helena Hempel) el Lwów. Jen ŝia traduko:

MIHALKO *).

Mihalko, malriĉa vilaĝano, kiu venis Varsovion por gajni monrimedojn, staris antaŭ la pordego de unu el urbaj domoj, konsiderante, kien li devas sin direkti, por trovi laboron. Tiam li ekrimarkis, ke sur la nepavimita strato, kie staris apenaŭ kelkaj domoj, svarmas teruritaj homoj. Ili kriis kaj montris per manoj

*) Popola formo de l' nomo Miĥaelo. (Rim. de l' tradukinto).

la nefinitan konstruajon, antaŭ kiu kuŝis tabuloj, rompitaĵoj kaj tute novaj ruboj. Super ĉio leviĝadis ruĝa polvo el briko.

Miĥalko alkuris pli proksimen. Tie li jam ekvidis kio okazis. Jen — estis falinta nova domo.

Unu flanko tute dispeciĝis de supre ĝis tero, kaj la dua en pli granda parto.

En la breĉitaj muroj pendis fenestraj kadroj kaj du traboj, destinitaj por surportado de plafonoj, malsuprenfalis, fleksiĝis kaj frakasiĝis kvazaŭ splitoj. En la fenestroj de najbaraj domoj aperis ektimigitaj virinoj. Sed sur la strato, krom la laboristoj, trovis sin apenaŭ kelkaj personoj. La famo pri la akcidento ne havis ankoraŭ tempon por atingi la urbmezon.

La unua konsciigis ĉefa majstro.

— Ĉu neniu pereis? — li demandis tremante.

— Ŝajnas ke ne. Ĉiuj ĉeestis dum la matenmanĝo.

La majstro komencis kalkuli siajn laboristojn, sed senĉese eraris.

— Ĉu alestas la laborkunuloj?

— Ni estas!

— Kaj la helpantoj?

— Ni estas!

— Andreo malestas — aŭdiĝis unu voĉo.

— Jes, li trovis sin interne.

— Oni devas lin serĉi — diris la majstro per raŭka voĉo.

Kaj li iris al la renversita domo kaj post lin kelkaj pli kuraĝaj.

Miĥalko senpripense ankaŭ proksimiĝis.

S-ino Hempel bonvolu nin sciigi, ĉu ŝi bezonas la plenan tekston por traduki la ceteran parton de la noveleto. Ankaŭ indiki la libron (4 zł) deziratan.

Aliaj konkurs-partoprenintoj: 1) Ing. Chmieliński (kiu sendis longan versaĵon koncerne la antaŭan T. K.-on, nepublikigeblan, bedaŭrinde), 2) A. Dowgierd, 3) E. Kołodziej, 4) S. Litwiński, 5) T. Niedźwiedz, 6) Oho (tre bona), 7) Bron. Pruc, 8) I. Sercarz, 9) Dro Br. Skałkowski, 10) A. Troszyński (aparte menciinda).

La sekvanta konkurso aperos en oktobro k. j.

Dr. Leopold Dreher.

POLLANDA KRONIKO.

BIALYSTOK. Malgraŭ la someraj monatoj la loka Esp. S-to sukcese daŭrigas la kutiman intensivan laboron por disvastigo de Esperanto. La somera kurso jam finiĝis kaj la ekzamenoj montris bonan sukceson. Multe da atento nunjare dediĉis la S-to al la eksterurbaj ekskursoj, kiuj plej bone servas al kunligo de utila kun agrabla propagandante Esperanton dum agrabla ripozado de la societanoj en la belaj somerloĝejoj ĉirkaŭaĵoj de Białystok. Ni ankaŭ havis la plezuron akcepti kelkajn eksterurbajn ĝesamideanojn inter ili: S-ron M. Stankiewicz el Święciany, F-inon Zieleniec el Łomża k. a. Ankaŭ vizitis nin S-ro L. Agurtin el Parizo, kiu la 24. VII. prelegis en la Societejo antaŭ multnombra aŭskultantaro pri la esperanta movado en Francujo. La 21. VI. okazis la ĝenerala Jarkunveno de la S-to, dum kiu i. a. estis decidite: kunvoki en septembro en Białystok Regionan Kongreson de Esperantistoj de Białystoka vojevodlando, entrepreni la aĉeton de la naskiĝdomo de Zamenhof k. a. Interalie la Kunveno atentante la grandajn meritojn de la loka lerneja Inspektoro S-ro Jurecki por progresigo de nia movado, decidis elektin lin kiel honoran membron de la S-to. En la Komitato oni elektis: S-ro J. Sapiro (prez.), Placek (v-prez.), F. Kurjański (sekret.), J. Tynowicki (kas.) kaj J. Kubala (anst.). S-ro K. Sapiro k. F-ino F. Wajntraub.

La okazintajn Kongresojn Pollandan en Poznań partoprenis el Białystok 13 personoj kaj la Universalan en Budapeŝt (ankaŭ Vieno kaj Praha) 3 personoj. La raportoj pri la Kongresoj aŭskultitaj kun granda intereso de multnombra ĉeestintaro okazis la 19. VII. (pri Poznań) farita de S-ro F. Kurjański kaj la 29. VIII. (pri Budapeŝt) de S-roj F. Kurjański kaj Sapiro. Estas notinde ke la lasta ĉe la Kongreso reprezentis la Urbestaron de Białystok kaj en ĝia nomo transdonis al la Kongreso la saluton.

GRODNO. La 20. VII. alvenis ĉi tien la ekskursanoj de Zam. Esp. S-to el Białystok (30 pers.). Kiuj vizitis la urbajn vidindaĵojn, lokajn somerloĝejoj ĉirkaŭaĵojn k. t. p. ĉie propagandante Esperanton per disdonado de flugfolioj. Dank' al la ekskurso aperis granda intereso por Esperanto kaj espereble en la proksima estonteco multaj lernos ĝin ĉe la speciale starigota kurso.

KRAKÓW. En la loka ĵurnalo „Czas“ aperis propaganda artikolo de prof. Bujwid s. t. „Esp. en Japanujo“, en kiu la aŭtoro prezentas grandegan antaŭenpaŝon de Esp. en Japanujo.

LUBLIN. Dum la kunveno de P. E. A. okazinta la 11. VII. k. j. raportis la sekretario s-ro Cz. Pruski pri II Pollanda Esp. Kongreso kaj rakontis pri siaj impresoj de Pollanda Ĝisnuna Prezidanto de P. E. A. forlasis Lublinon kaj translokiĝis al Łódź. — Kafejo „Warszawska“ apud str. Krakowskie Przedmieście Nr. 60. — estas elektita kiel „Esperantista renkontejo“; por dispono de gastoj estas elmetitaj en la kafejo 9 esp. gazetoj nome: „Pola Esperantisto“, „Heroldo de Esperanto“, „Oomoto Internacia“, „Esperanto“, „Internacia Medicina Revuo“, „Katolika Revuo“, „Etulo“, „Internacia Pedagogia Revuo“ kaj „ISK“. — Trapasantaj ĝesperantistoj estas bonvenataj.

LWÓW. En la kunveno de UEA-noj okazinta la 18. VI. k. j. oni elektis s-ron d-ron Fels kiel delegiton kaj kiel vicdelegiton la ĝisnunan: s-ron Kucharz.

ŁOMŻA. Kaŭze de la alveno de ekskursantaj gesamideanoj el Białystok la 17. VIII. la lokaj esperantistaj aranĝis por ili tre varman akcepton. Oni kune vizitis la vidindaĵojn, arbaron, riveron en tre agrabla kunestado. Ankaŭ okazis komuna tagmanĝo k. vespere bankedo kun propaganda vespero dum kiu okazis prelegoj de S-ro M. Perelman kaj F. Kurjański kaj koncertaj numeroj plenumitaj de gesamideanoj: Osovicki, K. Szapiro, Zonsajn, Darguzański k. F-ino B. Mekler. La vespero finiĝis per dancado kaj kantado de la Himno. La ekskurso kaj la vespero faris en la urbo grandan impreson.

SŁOMNIKI. Tie-ĉi gvidas s-ano J. Rozenblum 5 esp.-kursojn kun 65 partoprenantoj.

SOSNOWIEC. Dank' al klopodo de Esp. Delegitaro de Zagłębie okazis la 13. VIII. k. j. konferenco de prelegantoj kaj instruantoj de Esp. dum kiu oni priparolis metodojn de la propagando. Loka gazetaro de Zagłębie favore raportas pri nia movado. Elektitaj delegitoj nome s-roj d-ro A. Ingster kaj Bol. Czechowski vizitis lernejspektoron Winiarski en Będzin, petante permeson propagandi Espon inter la instruistaro, je kio li konsentis.

EDZIŜOJ. S-roj L. Kaplan, N. Lew kaj M. Sacman, membroj de Zam. Esp. S-to en Białystok. Koran gratulon.

MORTO. Mortis la patro de nia samideano S-ro Segalowicz en Białystok. Sinceran kondolencon.

FIANĈIĜO. S-ro I. Zuskowicz, membro de la S-to en Białystok fianĉiĝis. Koran gratulon.

Ekzamenoj dum la III. Pollanda Esp. Kongreso.

Kiel konigite, dum la III. tutpollanda esp. kongreso okazis ekzameno. Ĝin faris sukcesplene s-ino Elizabet Lübeck el Tallin, Estonujo kaj s-o M. Bursztyn el Warszawa. (Koran gratulon, La Red.).



LEOPOLD KRONENBERG.

La 7-an de aŭgusto 1929 en Warszawa la morto forrabis el niaj vicoj unu el la plej agemaj, plej aktivaj esperantistoj de Pollando — Leopold Kronenberg, diplomita profesoro de lingvo Esperanto, aŭtoro de la plej disvastigita lernolibro esperanta por Poloj s. t.: „Samouczek pomocniczego języka międzynarodowego Esperanto — w dwunastu lekcjach metodą własną“, kiu en sia 4-a eldono de la jaro 1927 atingis jam la ĝeneralan eldonkvanton de 33 mil ekzempleroj.

Pro manko de loko en tiu-ĉi Nro ni bedaŭrinde estas devigitaj prokrasti al la sekvonta Nro la pli detalajn sciigojn biografiajn pri lia tutviva por-esperanta laboro.

Tie-ĉi ni nur mencias, ke la enterigo, okazinta je la tombejo Brudno en Warszawa la 14-an de aŭgusto, estis modesta sed tre serioza manifestado esperanta. Ĉeestis ĝin reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj grupiĝoj esperantaj de nia ĉefurbo. Adiaŭis la foririnton al eterna paco: f-ino Lidja Zamenhof, sekretario de laborista esper. Societo „Praca-Laboro“ J. Zawada kaj s-ro Wiesenfeld.

Al la postrestinta edzino, s-ino Michalina Kronenberg en Bydgoszcz la redakcio de „Pola Esperantisto“ kaj la „Pola Esperanta Delegitaro“ en la nomo de ĉiuj pollandaj esperantistoj esprimas sian tutkoran konsenton.

Honoro al nia memoro!

BIBLIOGRAFIO.

Danco de Skeletoj, unuaktaĵo de Ujaku Akita. El japana lingvo esperantigis Hajime, Suzui. Eldone de Japana Esperanto-Instituto, Uŝigome Ŝin' Ogaŭamaĉi III—14, Tokio. Prezo nemontrita.

Loko de la agado: ambulanca tendo por rifuĝintoj de l' terura kataklismo. Tempo: 1923, kiam tertremego kaj fajrego skuis la ĉefurbon Tokio.

Krome estas du aliaj scenajoj de la sama aŭtoro, tradukitaj de Suzui kaj Suzuki. La esperanta lingvo de la tradukintoj estas bona, pli ol tiu de aliaj orientanoj. La eksterajo de la libro zorgoplena, laŭdon meritanta. Japana Esperanto-Asocio donis per ĝi pruvon de sia estimindeco. Serioza organizajo ĝi estas, same grava en Oriento kiel ĝiaj frataj organizajoj en Parizo kaj Londono.

Dr. L. Dreher.

Klasika legolibro. Em. Robert, 5, Rue Ravignan, Paris (18-e). Paĝoj 32, Prezo: 1.25 fr, afrankite 1.50 fr. La libreto enhavas kelkdekon da bone elektitaj kaj belaj ĉapitroj, verkitaj de lingvospertuloj. Ilia enhavo plejparte ŝerca kaj ĉiam interesa rekonmendigas la libron por la uzado de jusaj kursfinintoj kaj aliaj personoj, kiuj volas amuziĝante perfektigi en la lingvo. Krome ĉiuj personoj legos la libreton kun intereso, kaj profito por ilia lingvokono.

Chemnitz. Bele eldonita konciza gvidfolio tra la urbo senkoste ricevebla de: Fremduloficejo en Chemnitz J-Kirchplatz 1. Germanlando.

Elektitaj Versaĵoj, de Marie Under el la estona lingvo tradukis Hilda Dresden. Prezo: 2. sv. fr, sendkostoj ne enkalkulitaj. 30% rabato ĉe mendo de almenaŭ 10 ekzempleroj. Paĝoj 96. Aĉeteble ĉe: Esperanto Asocio de Estonio, Tallin, Estonio, Postkast n-ro 6. Tre lerta poezia traduko imitanta rimon kaj ritmon de la originalo permesas ekkoni fremdan al ni ĝisnun eminentan poetinon de niaj nordaj najbaroj. Tre riĉa enhavo de la versaĵoj, originalaj komparoj, diverseco de l' ritmoj kaj kelkfoje nekutimaj rimoj elmontras unuflanke veran talenton de la poetino kaj duaflanke majstrecan lingvoregadon de l' tradukantino. Ni devas nur bedaŭri, ke mankas enkonduko, de kiu ni povus sciigi almenaŭ kelkajn informojn pri la estona literaturo, kiu laŭ havigita al ni elekto de la versaĵoj prezentas sin tre interese.

Universala stenografio. La konata stenografisciencisto Felix de Kunovski en Potsdam sukcesis post jardeka laboro konstrui mallongskribon, kiu sen aliigo de la sonosignoj estas uzebla por ĉiuj lingvoj kaj kiu tial nomiĝas Internacianal-stenografio. S-ro de Kunovski jam pretigis gvidilojn por 22 lingvoj, el kiuj ĝis nun aperis 15, nome por la esperanta, germana, angla, franca, hispana, itala, pola, rusa, sveda, dana, nederlanda, portugala, rumana, greka kaj latina lingvoj. Baldaŭ aperos la gvidiloj por la serba, bulgara, ĉeĥa, ukraina, hungara kaj japana lingvoj. Pro la internacia disvastigo, ĉiuj gvidiloj estas verkitaj en la internacia helplingvo Esperanto. En la nunaj tagoj aperis germanlingva instruilo por la „germana mallongskribo“ de la Internacianal-stenografio. La „Regna Asocio por Nacionalsteno-grafio“ Duisburg, Friedenstrasse 79, batalas por la disvastigo de la Internacianal-stenografio.

Theta.

Recenzo de aliaj alsenditaj libroj aperos pro manko da loko en sekvonta numero.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Sapiro, Lipowa 33, Białystok.

OFICIALA BULTENO No 9.

KAŬZO DE PROKRASO. Ni informas, ke pro la kongresa kaj postkongresa vojaĝo de la Ĉefdelegito aro da aferoj ne povis estis rapide plenumita. Bonvolu do ne malpacientiĝi. Ĉio estas sinsekve plenumata!

JARLIBRO 1929. Pro diversaj teknikaj malhelpoj la Jarlibro aperis kun malfruo kaj estis dissendita nur fine de julio. Membroj eble nericevintaj ĝin bonvolu informi la Ĉefdelegiton. Novaj membroj, aliĝantaj nun, ricevas la Jarlibron senprokraste.

PUBLIKA DANKO. Ni plenumas agrablan devon, diskonigante, ke la UEA-kunveno dum la III Pollanda Kongreso de Esperanto en Poznań la 29-an de junio n. j., aŭdinte el la raporto de la Ĉefdelegito pri bonega disvolviĝo de UEA en Varsovio, esprimis sian dankon al la Delegito s-ro Włodzimierz Miernicki kaj al

la Vicdelegitino f-ino Halina Weinstein pro ilia fervora laborado por UEA.

NEREPAGINTOJ. Ni ĝoje konstatas, ke certa parto da nerepagintoj post niaj lastaj alvokoj ree aliĝis al UEA. Ni esperas, ke ankaŭ la restantaj faros sian devon kaj restos fidelaj al UEA. Tuj post ricevo de ilia kotizaĵo ni ekspedos al ili la Jarlibron, gazeton kaj ĉiujn necesajn dokumentojn.

UZU LA SERVOJN DE UEA! Nia Asocio ekzistas por servi al la Esperantistaro per praktika apliko de nia internacia lingvo. Uzu do ĉe ĉiu taŭga okazo la servojn de UEA! Se vi deziras akiri ian informon el eksterlando, skribu al la Delegito en koncerna loko, kies adreson vi trovos en la Jarlibro. Algluu kuponon por servopeto kaj aldonu respondkuponon. Uzu praktike nian lingvon kaj vi miros, spertante, kian utilon ĉiuflankan alportas nia Asocio dank' al Esperanto.

STATO DE UEA EN POLUJO. La UEA-anaro en Polujo malrapide, sed konstante plimultiĝas. La 1-an de Septembre n. j. ni havis 407 membrojn (3 DM, 4 MS, 249 MA kaj 151 M). Ni daŭrigu ĉiuj kun fervoro nian varblaboron, memorante, ke plimultiĝo da UEA-anoj en Polujo signifas plifortiĝon de la Esperanta movado en nia lando. La Delegitoj kaj la Ĉefdelegito volonte disponigos al ĉiu varbemulo necesan propaganda-materialon.

NOVAJ DELEGITOJ. Informo pri novaj Delegitoj aperos en sekvonta Bulteno.

Białystok, la 1. 9. 1929.

J. Sapiro, Ĉefdelegito de UEA.

W SPRAWIE UZUPEŁNIENIŃ DO SŁOWNIKA.

Do druku uzupełnień słownika w myśl naszej odezwy uzyskaliśmy dotąd następujące materiały:

- 1) Dra Drehera materiały drukowane w P. E. w r. 1927 i 1929.
- 2) Dra Felsa ze Lwowa (45 wyrazów).
- 3) P. Grenkamp-Kornfelda z Paryża (54 wyr.).
- 4) P. Horszowskiego z Bolechowa (121 wyr.).
- 5) Dra Blassberga z Krakowa słowniczek wyrażen lekarskich w 4 zeszytach.
- 6) P. Wierzchowskiego ze Lwowa bardzo bogaty zbiór nowych wyrazów (— głównie t. zw. wyrazów obcych —) zestawiony ze słowników: Kabe, Verax, Boirac, Jürgensen, Benneman, Rollet de l' Isle, Stojan, Zamenhof, Boulet, Grosjean Maupin, du Ménil, Kreuz, Mazzolini, Hecker i in.
- 7) P. Orzecha z Tarnowa zbiór uzupełnień słownikowych, gromadzonych w ciągu kilku lat (ponad 2.000 wyrazów polskich).
- 8) Dra Czubyńskiego z Garwolina.
- 9) P. Hodakowskiego z Krakowa (około 500 wyr.).

W ten sposób zebrany materiał przedstawia się dość pokaźnie, gdyż (bez wliczenia bogatych zbiorów Dra Blassberga i H. Wierzchowskiego, stanowiących same przez się osobne słowniczeki) już obecnie zawiera około 2.600 wyrazów nagłówkowych polskich a około 9.000 wyrazów esperanckich.

Mimo to wobec bogactwa słownictwa w języku polskim zdajemy sobie sprawę z tego, że nie jest to jeszcze wszystko, co do słownika wstawić można, a nawet można wyrazić przypuszczenie, że wobec ustawicznego rozwoju języka słownik nigdy nie nadaży potrzebom życia we wszystkich jego objawach.

W przypuszczeniu, że jeszcze wiele materiałów znajduje się w rękach naszych samideanów, zwracamy się ponownie z apelem i prośbą o oddanie ich do użytkowania słownikarskiego, przyczem dodajemy, że chodzi o wyrazy w słowniku Grabowskiego zamieszczone.

Wszystkim wymienionym jakoteż i przyszłym współpracownikom wyraża Redakcja „samideanan dankon” za dostarczenie materiałów.

Dodatki należy przesyłać pod adresem: Józef Orzech, dyrektor II gimnazjum w Tarnowie.

ALVOKO.

Al ĉiuj Esperantistoj samtempe religiaj (kristanaj) socialistoj, mi faras la urĝan peton konatigi sin al mi (plenan nomon kaj adreson! mi petas) por ke ni komune agadu kaj servu la internacian religian (kristan-) socialistan movadon. Ni pruvos tiel agante la utilon de Esperanto kiel interfratigilon kaj interkomunikilon por nia movado.

Kun frataj salutoj, Via samspiritano, J. L. Bruijn,
Daguerrestraat 156, Hago (Nederlando) Poŝtĉekkonto No. 860.

LETERKESTO.

S-o P. el Lomza. Via versaĵo estas bona, tamen iam malfruiĝinta. Nun ni ne havas jam okazon reveni al la temo pri eksp. Domaĝe!

S-o R. el Dąbr. G. Vian noveleton post kelkaj malgrandaj ŝanĝoj ni presigis. Pri la ricevita dua ni poste decidis.

Ciujn ni petas alsendi presotaĵojn maŝinskribitaj. Se tio ĉi estas absolute neebla oni devas skribi treege legeble prefere per presliteroj, aŭ kaligrafie, precize distingante „n“ kaj „u“, „r“ kaj „v“, „e“ kaj „c“ ktp. Almenaŭ iomete faciligu al ni laboron. Ni tre petas.

TEKSTO DE L' MINISTERIA DECIDO.

Laŭ peto de kelkaj samideanoj ni prezentas ĉi sube tradukon de ministeria decido, kiu permesas enkonduki Espon al lernejoj kiel nedevidan objekton:

„Ministerio de religiaj konfesoj kaj publika klerigado.

Warszawa 18 de aŭgusto 1928.

Nro II-P 5212/28.

Koncerne Esperanton.

Al Sinjoro Profesoro Dro O. Bujwid

en Kraków, Lubicz 34.

Ministerio de Religiaj Konfesoj kaj Publika Klerigado rilate al persone de Vi ĉi-afere prezentita demando komunikas, ke ĝi lasis al Ministerio de Eksterlandaj Aferoj laŭ kompetenteco eventualan subskribon flanke de Polujo de „Accord relatif“ á l' Esperanto aldonante, ke ĝi emas permesi enkondukon de Esperanto en lernejojn, maksimume kiel nedevidan objekton konforme al anonciĝado de l' volontaj lernantoj, tamen ne povas tiun ĉi objekton enkonduki devige, antaŭ ĉio tial, ke ĉi tiu troŝarĝon de programoj de niaj lernejoj per la nova objekto opinias neĝusta.

Anstataŭanto de Direktoro de l' Departamento
B. Kielski. Fakestro.

(Red.)

DE LA ADMINISTRACIO.

Pro la kongresa kaj postkongresa vojaĝo de la Administranto aro da aferoj ne povis estis rapide plenumita. Bonvolu do ne malpacientiĝi. Ĉio estas sinsekve plenumata!

ZAWIADOMIENIE.

w sprawie kursów korespondencyjnych języka Esperanto prof. Leop. Kronenberga.

Zarząd Robotniczego Stowarzyszenia Esperantystów „Praca-Laboro“ w Polsce, z siedzibą w Warszawie (adres Zarządu: Warszawa, ul. Marszałkowska 81, m. adw. Litauera) niniejszem zawiadamia esperantystów w Polsce, że w porozumieniu ze spadkobierczynią, wdową po ś. p. prof. Leopoldzie Kronenbergu, przejął prowadzenie „Kursów Korespondencyjnych“ na dotychczasowych warunkach:

Chcący pobierać naukę języka Esperanto drogą korespondencyjną, wpłaca na konto PKO. Warszawa Nr. 20845, Jan Zawada, sekretarz „Laboro“ — sumę zł 12, poczem otrzymuje bezpłatnie samouczek, poprawianie ćwiczeń i inne wskazówki, dotyczące kształcenia się i doskonalenia w języku Esperanto — drogą listowną. Kierownictwo kursów korespondencyjnych „Laboro“ objął Dr. M. Weissblum. Wszelkie sprawy, związane z dotychczasowym prowadzeniem kursów należy skierować listownie na powyżej podany adres.

Za Zarząd:

Jan Zawada, sekretarz.

Józef Litauer, przewodniczący.

PS. Równocześnie Zarząd „Laboro“ zawiadamia, że wpłaty na wydany przez Stowarzyszenie „Pełny podstawowy słownik języka międzynarodowego Esperanto“ uskutecznić obecnie można na wyżej wspomniane konto PKO. Nr. 20845 Warszawa. (Porówn. ogłoszenie).

ĈU VERE vi ne legis ankoraŭ la bonegajn originalajn Esperantaĵojn, tre favore recenzitajn de la tuta Esperanta gazetaro? JEN ILI ESTAS:

J. Šapiro (Joŝo). Babiladoj de bonhumora Zamenhofano. Kun ilustraĵoj. Dua eldono 1.— zł.

M. L. Kaplan. Akordoj Esperantaj. Originalaj poemoj kaj versaĵoj Esperantaj. 0.80 zł.

Feliks Hiller. Ho, tiuj fremduloj! Sola originala Esperanta opereto kun muziknotoj. 1.40 zł.

Aperis lasttempe prilaborita de Jan Tichawski.

„LA MONDLINGVO“

plena kurso kun gramatiko kaj vortaro por lernejoj, privata instruado kaj lecionoj per radio. Prezo 7.50 zł

Per sendkostoj aldonu 10%, por rekomendita sedajo plu 50 gr. Pagu ĉion je nia poŝtĉekkonto Kraków PKO. N-o 406.660. kaj direktu vian mendon al la Libreja Fako de „Pola Esperantisto“, Kraków, ul. Smoleńska 9.

Nakladem: „Robotniczego Stowarzyszenia Esperantystów Praca-Laboro“

w Warszawie, ul. Marszałkowska 81. m. adw. Litauera

wyszedł z druku najnowszy

„PEŁNY PODSTAWOWY SŁOWNIK JEZYKA MIĘDZYNARODOWEGO ESPERANTO“

wraz z kompletną gramatyką i objaśnieniami, z uwzględnieniem uchwał Akademii Esperanckiej w Paryżu z r. 1929, w opracowaniu Jana Zawady. Słownik ten stanowi nieodzowne uzupełnienie każdego samouczka esperanckiego jak również ze względu na „3-ci i 4-ty Dodatek do Fundamenta“, powinien się znajdować w rękach każdego już zaawansowanego esperantysty nawet posiadającego słowniki Grabowskiego, jako stały podręczny przewodnik co do oficjalności używanych w Esp. wyrazów. Cena dla Stowarzyszeń, Kół i grup esper. w Polsce i ich rzeczywistych członków, zamawiających bezpośrednio u nakładcy pod adresem: Jan Zawada, Miasto-Ogród Czerniaków, ul. Zaciszna 1. Warszawa zł. 2.50, w księgarniach i Libreja Fako „Polskiego Esperantysty“ Konto P.K.O. 406.660 — 4 zł. Przy zamówieniach należy dodać 10% na koszty przesyłki. Polecona przesyłka 50 gr. więcej.

Libreja Fako de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Smoleńska 9. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS:

Poŝtkartoj propagandaj „Babel“ 10 pecoj 0.50

Glumarkoj „Babel“ 10 pecoj 0.10

Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30, 4.50.

La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio 5.60

Fundamento de Esper. (5-lingva) 2.30

Lingvaj Respondoj 2.80

Proverbaro Esperanta 2.70

Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po 4.40

Goethe — Ifigenio en Taŭrido 3.30

Gogol — La Revizoro 3.30

Heine — La Rabeno de Baharaŝ. La Gimnazio 2.30

Molière — Georgo Daudin 1.75

Orzeszko — Marta 5.50

Schiller — La Rabistoj 3.30

Shakespeare — Hamleto 2.75

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Baŭcki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Bonnsels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La aplika de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.20
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krioj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Grillparzer — La monaĥejo ĉe Sandomir	1.30
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Morgaŭ matene	2.60
Klucz do Esperanta — Brzydkie kaczątko	0.60
Kongreslibro de l' VIII en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Lippmann — Sprachliche Gutachten	2.00
Malgranda terbiblio	2.00
Mickiewicz — Improvizacio de Konrad	0.50
— Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Polai Kristnaskaj Kantoj	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof	5.40
Prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj	1.50
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Schmidt — La amkonkurantoj	0.85
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Stall — Aŭtunaj agordoj, trad. Tuwim	1.00
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	1.50
Vigny — La intervidigo kaj nekonita dialogo	0.90
Wiesefeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%
 Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.